


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 581 (4)

APRILo 1954



Teylers-hofje (Azilo Teyler), Haarlem

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj Artikoloj :	paĝo
Berlino—Genevo—Montevideo : <i>Hans Jakob</i> ..	97
Kazoj en Esperanto : <i>J. Régulo Pérez</i> ..	115
Pri la recenzado Esperanta : <i>F. R. Banham</i> ..	119
La Agrara Reformo en Italujo : <i>L. Minnaja</i> ..	123
Voko al Individuaj Esperantistoj : <i>T. K. Slade</i> ..	125
Poezio :	
La Pioniroj : <i>Brendon Clark</i> ..	98
Lasta Preĝo : <i>Ada Negri (L. Minnaja)</i> ..	103
La Ministo : <i>Henrik Ibsen (L. Fridén)</i> ..	104
Prozo :	
La Limo : <i>Jolanthe Leser</i> ..	105
La Plugisto : <i>J. L. Marris-Fransen v.d. Putto</i> ..	122
39a Universala Kongreso :	
Oficiala Komunikado n-ro 6 ..	110
Haarlem : <i>Mason Stuttard</i> ..	111
Konstantaj Rubrikoj :	
C.E.D. ..	101
Enigma Konkurso ..	118
Esperantista Vivo ..	128
Internacia Konkurso 1954 ..	98
Oficiala Informilo ..	126
Radio kaj Esperanto ..	114
Tra la Libraro ..	108
Tra la Mondo Esperantista ..	99

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 581

Aprilo 1954



Berlino—

Genevo—

Montevideo—

KUN espero miksita je dubo, la homaranoj turnis sian rigardon kontraŭ Berlino kie dum pasinta februaro kunvenis la Grandaj Kvar por solvi problemojn de kiuj dependas la sorto de la tuta mondo. Pasis 75 jaroj, de kiam en 1878 okazis tia kunveno en Berlino (La Berlina Kongreso) por reguligi la situacion sur Balkano, post la rus-turka milito. Prezidis tiun ĉi kongreson Bismarck, kies personeco igis lin arbitrancianto. Kia fundamenta ŝanĝo inter 1878 kaj 1954, la juna Germana Regno tiam *subjekto*, kaj en 1954, *objekto* de la diskutoj.

La fino de la nuna kunveno de potenculoj ja konfirmis profetaĵojn de la pesimistoj. La mondo formas du blokojn reciproke sin suspektantaj. Ne estas nia tasko serĉi kaŭzojn. Jam estas multaj, kiuj tion faras. Nin tamen interesas alia detalo: en 1878 la kunvenintaj Diplomatoj kaj Ministroj interkompreniĝis per franca lingvo. Ilia esprimmaniero estis selektita, kortegeca. En 1954 pluraj lingvoj devis esti uzataj; aro da spertaj interpretistoj transdonis la

parolojn, teknikaj aranĝoj laŭdire *faciligis* interkomprenon. La kunvenintoj parolis malsamajn lingvojn, parole kaj ideologie. Kia diferenco ĉe Esperanto-kongreso, kie facile fluas la parolo kaj ordiĝas la ideoj.

Sekvos post Berlino, nova kunveno en Genevo. Ĉu la kompromisa atmosfero ĝeneva sukcesos triumfi en tiu ĉi diskutado, ni rajtas pridubition! Certe estas, ke en iuj detaloj, ne tuŝantaj funde prenitan pozicion, oni interkonsentos, sed restos la tensio.

Dum Oktobro kunvenos en Montevideo la Konferenco de UNESKO, ne tiom rimarkata de la ĝenerala publiko, sed despli de *ni Esperantistoj*! UNESKO laŭstatute ne okupiĝas pri pur-politikaj problemoj, sed iarilate iuj problemoj iĝas politikaj. Tia estas la kazo kun la demando pri la internacia lingvo, precize pri Esperanto. El nete lingvesocia problemo, kiel ni ĝin ĉiam konsideris, la demando iĝis politika afero, ĉar tiel ĝin stampis certaj el niaj potencaj kontraŭuloj. La stranga situacio estas, ke la ĉefroluloj en la

nuna antagonismo, en unu punkto interkonsentas: nome, ke por ili la internacia lingvo estas tabuo. La grado de kontraŭeco diferencas: en Oriento oni ne toleras agadon favore de Esperanto, en la Okcidento oni ignoras ĝin. Tiu ĉi sinteno nature komplikas por ni la laboron en Montevideo. Nia devo kaj devizo estas fari ĉion, kio eblas, por favorigi nian aferon, sed ne atendi miraklojn. *Prudenta skeptikismo pri la volo kaj povo de registaroj, sana optimismo pri la bono de la afero, kiun ni defendas; tiel ni rigardas la venontaĵon.*

Hans Jakob.

Internacia Konkurso 1954

Stato je la 28a de februaro

		Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando	..	2000	2330	116.5
2. Urugvajo	..	250	270	108.0
3. Svislando	..	1500	1445	96.3
4. Germanujo	..	3600	3180	88.4
5. Nederlando	..	4600	3860	83.9
6. Japanujo	..	900	725	80.5
7. Portugalujo	..	500	400	80.0
8. Italujo	..	2900	2245	77.4
9. Hispanujo	..	1600	1190	74.4
10. Kanado	..	250	185	74.0
11. Francujo	..	5600	4068	72.6
12. Britujo	..	9500	6576	69.2
13. Svedujo	..	5900	3945	66.8
14. Sudafriko	..	300	195	65.0
15. Usono	..	2300	1436	62.4
16. Belgujo	..	2300	1419	61.7
17. Aŭstralio	..	1000	610	61.0
18. Danlando	..	2500	1490	59.6
19. Kubo	..	250	145	58.0
20. Venezuelo	..	250	140	56.0
21. Jugoslavujo	..	1600	880	55.0
22. Norvegujo	..	2300	1255	54.5
23. Maroko	..	700	310	44.3
24. Aŭstrujo	..	850	375	44.1
25. Irlando	..	250	95	38.0
26. Izraelo	..	250	95	38.0
27. Islando	..	350	130	37.1
28. Argentino	..	950	345	36.3
29. Novzelando	..	850	195	22.9
30. Brazilo	..	6400	1240	19.4

La Pioniroj

Kun nova espero kaj koro kuraĝa,
Sur grundo silenta en lando sovaĝa,
La noveveninto de ie trans maro
Forhakis vivspacon en densa arbaro.
Muskola ĉe brako, fortika ĉe kruro,
Li plantis la semojn de fina sekuro,
Kaj en la dometo el krudaj tabuloj
Li loĝis feliĉe kun geaj karuloj.
Najbarojn li tamen malofte vidadis,
Ĉar, kvankam aliaj la landon invadis
Distancoj tro grandaj dislokis la

domojn,
Kaj nur samceleco kunligis la homojn.
Per memfidaj manoj kaj daŭra

kontrolo,
Per vigla pensado kaj verva privolo,
Li gajnis sufiĉe por junfamilio,
Kaj pri la cetero li fidis al Dio.

Do, kiam somere la fajro alzumis,
Kaj semojn kaj herbon kaj bestojn
konsumis,

Kaj kiam en vintro torenta diluvo
Inundis la teron sub pezo de pluvo,
Neniam li paŭzis, neniam priploris,
Sed de la komenco denove laboris.
Kaj nekonatuloj salutis amike,
Kaj haltis por helpi, sindone, efike ...
Grandegaj civitoj la homojn nuligas:
Izola kunago korvarmon instigas.

Jen, eĉ en soleco troviĝas kontento:
Se multaj la homoj, malmulta la
sento.

Do ĝoju vi nun, kiuj nun pioniras:
Realon ne perdu dum revoj vin tiras.

Brendon Clark.

FERVOJA TERMINARO

Edward M. Rosher

68 paĝoj kun ilustraĵoj

Prezo 2 ŝil. aŭ 6 rpk.

Mendu ĉe U.E.A.



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstralio

La 9a Aŭstralia Esperanto-kongreso okazis kun granda sukceso en Perth (Okcidenta Aŭstralio), la 1an ĝis 7a de januaro 1954. Malfermis ĝin la Ministro por Edukado kaj Vic-Ĉefministro por Okcidenta Aŭstralio, S-ro J. T. Tonkin. Okazis ankaŭ oficiala akcepto flanke de la urbestro de Perth, S-ro J. Murray. Aliĝis al la kongreso 74 samideanoj, el kiuj 57 efektive partoprenis. Konsiderante, ke en Aŭstralio ekzistas nur proks. 180 Esperantistoj, kaj konsiderante la grandegajn distancojn, tio estas multnombra partopreno ĉe nia landa kongreso.

Elektiĝis la jena nova estraro: Prez.: Ken Linton, Vicprez.: A. Towsey, S. L. Parry, D-ro A. Einihovici, Sekr.: Herbert Koppel, Kasisto: E. McKenzie, Estraranoj: J. Matasin kaj D-ro A. Fridenbergs.

Seminario, interesaj prelegoj, Internacia Koncerto (kun 400 ĉeestantoj), kaj ĝuindaj ekskursoj en la belega ĉirkaŭaĵo de Perth, kompletigis treege bonorganizitan kongreson. La 10a kongreso okazos en januaro 1956 en nia federacia ĉefurbo Canbera.

Ĉeĥoslovakujo

En Olomouc, la 9an kaj 10an de januaro, okazis regiona kunveno en kiu partoprenis 90 gesamideanoj el 20 urboj. La temo de la kunveno estis: "La spertoj de E-kursoj kaj instruistoj, kaj la uzataj lernolibroj kaj instrumetodoj". Prelegis kaj

diskuton gvidis akademiano R. Hromada, el Praha. La tuta kunveno estis tre lerte organizita kaj bone sukcesis.

Francujo

La franca Ministro pri Nacia Edukado nomis S-ron Bosc, UEA-delegiton en Le Havre, "Oficiron de Akademio" pro la popola instruado de universala lingvo Esperanto.

Senpagan turisman gvidilon pri Sejna Valo sendas la Internacia Kongreso "Turismo kaj Esperanto"; adreso S-ro Bosc, B.P. 904, Le Havre, Francujo.

* * *

La 23a regiona kongreso de la fame-konata provinco Normandio okazos la 15an kaj 16an de majo en haveno Le Havre. La Kongreskomitato organizas samtempe Universalan Turisman Renkonton, kaj invitas ĉiujn eksterlandajn gesamideanojn.

La oficialaj poŝtaj servoj uzos specialan stampilon sur la kovertoj kun la vortoj: Congr s Esp ranto Le Havre. Adreso: Esperanto-kongreso, 25 rue Duguay-Trouin, Le Havre.

* * *

En Dinard, de la 28a ĝis 30a de Majo, okazos angla-franca kongreso de farmaciistoj. Anglaj kaj aliaj farmaciistoj kiuj intencas ĉeesti bonvolu informi S-ron P. Chevalier, 19 Bd. Gabriel Lauriol, Nantes (L. I.).

Japanujo

En la fino de januaro, vizitis Japanujon Lordo R. Adams, prezidanto de la Plenuma Komitato de UNESKO, kaj D-ro L. Evans, ĝia Ĝenerala Direktoro. Ĉe kunveno kun la Japana Nacia Komisiono por UNESKO D-ro Zenmaro Toki, direktoro de Komunuma Biblioteko en Tokio, oficiale donis mesaĝon al D-ro Evans, ke la japanaj esperantistoj observas kun intereso kaj espero la disvolviĝon de la Esperanto-problemo ĉe UNESKO.

Kelkajn tagojn poste, la du UNESKO-oficistoj ĉeestis en alia urbo kunvenon kun la ĉefaj figuroj de la UNESKO-aktiveco en Japanujo. S-ro Mijake-Ŝihej, direktoro de Japana Esperanto-Instituto, parolis pri lingvaj malfacilaĵoj, kiujn spertas japanaj kleruloj, citanta artikolon de japana sciencisto aperintan en ĵurnalo, en kiu li skribis pri ĉagrenoj de japanaj delegitoj en la Internacia Teorifizika Konferenco 1953 en Tokio. S-ro Mijake petis D-ron Evans rememori la vortojn de ĉi tiu japana sciencisto, kiam li konsideros la problemon de internacia lingvo en la UNESKO-kunveno. Ĝercis D-ro Evans: "Estas stranga hazardo—similan parolon mi aŭdis jam en alia urbo. Al mi ŝajnas, ke troviĝas iu potenca organizaĵo, kiu instrukcias nepre persvadi min . . . !" Li tamen serioze respondis, ke lia administracio preparas la kompilon de raporto pri Esperanto prezentota al la konferenco en Montevideo, kaj ke estas ebleco, ke la problemo de Esperanto eniros en la programon de UNESKO, nur se iu delegito de membro-ŝtato tion proponos en Montevideo.

Jugoslavujo

Fine de 1953 komencis aperi en Zagreb *Speleolog*, la revuo de grot-esplora sekcio de la turista societo "Zeljezničar". La revuo aperas kvarfoje jare. La subtitolo estas skribita en 5 mondlingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto. Estas merito de S-ano M. Gjivoje, teknika redaktoro de tiu ĉi unua tiaspeca revuo en Jugoslavujo, ke post ĉiu artikolo sekvas sufiĉe ampleksa (eĉ tutpaĝa) resumo en la Internacia Lingvo. Interesatoj pri fabela subtera mondo de Jugoslavujo abonu kaj interesigu la fakulojn, kiuj povas aboni sendante egalvaloron en fakaj libroj aŭ periodaĵoj pri speleologio, antaŭhistorio, arkeologio k.s. laŭ antaŭa interkonsento. Ekzemplero havebla kontraŭ 3 rpk. por eksterlandanoj. Peranto: M. Gjivoje, Vodnikova 19, Zagreb.

Nederlando

LKK de Haarlem oficialigis Postkongreson en Rotterdam, la 7an ĝis 11a de aŭgusto 1954. Plenajn detalojn kaj provizoran programon oni petu de: Esperanto-Postkongreso 1954, Sekr. S-ro J. M. J. Driesen, Sam. Mullerstraat 7a, Rotterdam West.

* * *

De la 24a ĝis la 31a de julio, 1954, okazos en Hilversum la deka Internacia Junular-kongreso de T.E.J.O. Kiel kongresejon oni disponos pri la Sportpark, sportkonstruaĵo ĉe la malgranda stacidomo Soestdijkerstraatweg, en ideala ĉirkaŭaĵo de belegaj arbaroj, vastaj erikejoj k.t.p.

Plenajn detalojn oni ricevu de la Loka Komitato, Lobeliastraat 4, Hilversum.



Centro de Esploro kaj Dokumentado
 300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Ankoraŭ pri la Esperanto-Ekspozicio en Montevideo

En la Februara numero de *Esperanto* ni publikigis detalajn informojn pri la decido organizi grandan Esperanto-ekspozicion okaze de la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo.

Laŭ la informoj pri kiuj disponas CED, pluraj Esperanto-organizaĵoj, institucioj kaj unuopaj esperantistoj jam sendis al Montevideo diversspecan materialon por tiu celo. Jen la nomoj de la sendintoj: E. D. Kennedy, E. M. Rosher, "La Skolta Mondo", Dansk Esperanto Forlag, Eldono Vilho Setälä, A. Ploussu, Verlag Limburger Vereinsdruckerei, Eldonejo D-ro Siegfried Ziegler, Libroservo de Hispana Esperanto-Federacio, Filiberto Garcia Hurtado, Heroldo de Esperanto, Norvega Esperanto-eldonejo, Svisa Esperanto Societo, D-ro I. Lapenna. Al ĉiuj sendintoj CED esprimas tre koran dankon.

Kiel oni vidas, la grandega plimulto de la landaj asocioj sendis al Montevideo ankoraŭ nenion. El la listoj de la sendita materialo vidiĝas, ke jam troviĝas en Montevideo kontentiga nombro da valoraj verkoj. Tamen, granda parto de la jam sendita materialo konsistas el broŝuroj kaj faldprospektoj. Kompreneble, ankaŭ tio estas tre utila por la ekspozicio, sed ni bezonas *antaŭ ĉio multe da libroj* ne nur nun havigeblaj, sed ankaŭ tiujn, kiujn oni ne plu povas aĉeti.

Tial la organizantoj de la Ekspozicio petas ankoraŭfoje ĉiujn landajn asociojn, Esperanto-eldonejojn, redakciojn de gazetoj kaj unuopajn esperantistojn sendi kiel eble plej baldaŭ kiom eble plej multe da materialo, precipe da libroj, al Montevideo je la adreso: **S-ro Rodolfo Garcia, Calle Yaguarón 1397, Montevideo, Urugvajo.**

Estas konsilinde relegi la informon pri tiu ĉi afero en la Februara numero de *Esperanto* kaj agi, se iel eble, laŭ la konsiloj entenitaj en la sama informo.

Ne timu, ke ni havos en Montevideo tro da materialo! Se estos senditaj pluraj ekzempleroj de la sama verko aŭ de alia publikaĵo, la organizantoj formos el tiu supermaterialo plurajn specialajn ekspoziciojn, kiuj estos senditaj al la landoj kun malforta Esperanto-Movado, precipe al kelkaj aziaj landoj, por helpi la pluan disvastigon de la lingvo en tiuj regionoj.

ESPERANTAJ RADIO-ELSENDOJ EN 1953

Laŭ la statistiko, kiun faris por CED ĝia kunlaboranto S-ro G. Larglantier, en la jaro 1953 la radio-stacioj Graz, Paris, Rio de Janeiro, Bern, Hilversum, Lille, Wien, Roma, Madrid, Valencia kaj Zagreb, do entute 11 radio-stacioj, elsendadis Esperanto-programojn. Tiuj stacioj elsendis en la jaro 1953 entute 845 programojn en Esperanto. En la

jaro 1952 ĉiuj radio-stacioj, kiuj elsendis en Esperanto, havis entute 741 programoj. Sekve la kresko de la Esperanto-elsendoj en la jaro 1953 kompare kun la jaro 1952 estas 94 elsendoj. Oni devas aldoni, ke en la jaro 1953 pluraj aliaj radio-stacioj, ekzemple Manresa, Tarragona, Montevideo, Osijek, Sarajevo, Beograd, elsendis kursojn kaj diversajn nacilingvajn programojn pri Esperanto. La progreso sur tiu ĉi kampo estas tre kontentiga.

RAPORTO DE CED EN LA GERMANA LINGVO

D-ro W. Herrmann, kunlaboranto de CED kaj ĝia komisiito por ĉiuj demandoj rilatantaj Esperanton antaŭ la Eŭropa Konsilantaro, ĵus finpretigis ampleksan memorandon en la germana lingvo por la Germanaj reprezentantoj en la Eŭropa Konsulta Asembleo kaj por diversaj aliaj germanlingvaj institucioj. La memorando baziĝas sur la raporto de CED al UNESKO pri la Internacia Lingvo Esperanto, pri kio ni informis en la Januara numero de *Esperanto*. CED gratulas al sia kunlaboranto D-ro Herrmann pro tiu grava laboro, kiun li plenumis en tiel taŭga formo.

Donacoj al CED

por la laborjaro 1954		£	ŝ.	p.
Ge-sroj Laurie, Anglujo	..	1	0	0
J. Guillaume, Francujo	..	1	4	7
J. H. Murray, Usono ..	..	1	0	0
Leeuwarden-grupo, Nederlando			18	6
Iu, Usono	..		7	0

Stato la 27an Feb. .. £4 10 1

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Rickmansworth, Herts., Anglujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris, 10, aŭ al la CED mem.

LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj.

★

Prezentado kaj komentado de
Prof. G. Waringhien

★

1a volumo, 1901-1906—388 paĝoj
2a volumo, 1907-1914—374 paĝoj
21 × 14.5 cm., bindita

★

NUNA PREZO :

Ĉiu volumo 17ŝ. 6p., afr. 9p.

★

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam konigas detalojn de vivo, karaktero kaj sentimento de la skribinto tiel ke personaj leteroj kompletigas biografiojn. En tiu ĉi libro ne temas nur pri leteroj de la majstro, sed ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj gvidantoj de nia ideo en la frua epoko de la movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon kaj detruos aron da legendoj.

Mendu ĉe :

Universala Esperanto-Asocio
Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo

Belartaj Konkursoj 1953: Poezio Traduka

Lasta Preĝo ricevis la 4an premion

Lasta Preĝo

Patro, se nuna preĝ' iam atingos
vian silenton, prenu ĝin, ĉar tuta
mia perdita vivo en ĝi ploras ;
se mi ne estas digna, pro l' grandeco
de l' bon' petata min dignigu, Patro.

Kiam mi mortos, ho ne donu pacon,
nek ripozon al mi en la stelriĉaj
foroj de la ĉieloĵ. Sur la tero
restu animo mia, restu inter
la homoj penaj, pezaj pro pekado :
kun ili viglu, agu, ĝi al ili
de via grac' estu peril' kaj lumo.
Postmorte lasu min plenumi bonon,
kiun dumvive mi plenumi kredis,
tre kompatinda mi ! kaj ne kapablis.
Ĉe vi valoru mia konfesata
pento, mia sufero, kaj la vana
karitofajro, kiu min detruas.
Iun tagon, post ploro de jarmiloj,
amo venkos malamon, nur am' regos
en la domoj de l' homoj. Ho ne povas
tiu tagiĝ' ne flori : en la gutoj
de l' sango makulanta nian teron
la virto ĝin preparas, ĉe la ombro
dolora pro la pen' de ĉiu raso.
En tiu tago estu mi la flamo
frata, brulanta ja en ĉiuj koroj,
la tagoj ĝin ricevu de la tagoj ;
ĝis daŭros viv', en ĝi mi vivu, Patro.

Ada Negri (trad. Luigi Minnaja).

LA JUNAJ DETEKTIVOJ de J. H. Sullivan

kun ilustraĵoj de Brenda Goodwin

Interesa rakonto por la junularo pri kontrabandistoj

Prezo 2 ŝilingoj, aŭfranko 2p. (aŭ 6 rpk.)

Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe U.E.A.

Belartaj Konkursoj 1953 : Poezio Traduka

La Ministo ricevis la 5an premion

La Ministo

Krevu rok', kun muĝ' kaj krak'
por mia peza martelhak'.
Mi sen halt' malsupren boras,
ĝis mi aŭdos, ke sonoras.

Funde en la monta koro
min atendas la trezoro,—
diamantoj, juvelŝtonoj
inter ruĝaj oraj zonoj.

En profundo estas paco
kvazaŭ en eterna spaco ;—
rompu vojon, vi martelo,
al la viv-enigma kelo !

Iam kiel knabo juna
ludis mi en brilo suna.
Sur printempa floro-vojo
vagis mi en paca ĝojo.

Mi forgesis pri taghelo
en la nokto-nigra kelo,
pri la freŝo de l' naturo
post la templo-dika muro.

Kiam tien mi eniris,
mi kun kor' senpeka miris :
Ĉu solviĝos de l' Subtero
la senfina viv-mistero ?—

Ne ankoraŭ scion gajnis
mi pri kio stranga ŝajnis.
Ankaŭ ne de l' terprofundo
lumo venis en abundo.

Ĉu do vere tiu vojo
gvidos al klarec' kaj ĝojo ?
Lum' blindigas ja okulon,
se mi iras en sunbrulon.

Ne, mi devas serĉi sube ;
tie regas pac' sendube.
Rompu vojon, vi martelo,
al la viv-enigma kelo !—

Martelhak' post martelhak'
ĝis la lasta vivo-tag'.
Ne anoncas eĉ lumero
brilan sunon de Espero.

Henrik Ibsen (trad. Henry Fridén).

HELSINGÖR

17-24 de julio 1954

okazos en la Internacia Altlernejo
internaciaj feriaj Esp-kursoj : daŭriga,
konversacia, prepara por Esp-instru-
ontoj (Cseh kaj lernolibra metodoj),
por Esp-gvidantoj kaj por infanoj.

Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando
Post la kurso aŭtobusa karavano al
Haarlem

ESPERANTISTA FERIO EN BELA SVISLANDO

23a ĝis 29a de aŭg. 1954

La Berna Popola Altlernejo disponigis
al la Svisa Esperanto-Societo la
komfortan kastelon Münchenwiler
(mezvoje inter Neuchâtel kaj Fribourg)
por tie okazigi perfektigan kurson.
En bela regiono vi pasigos agrablan
tempon kun instruo, distro kaj prelegoj
de eminentaj svisaj Esperantistoj.

Havigu al vi tuj la prospekton ĉe

Svisa Espero,

Hangweg 57, Liebefeld-Bern, Svislando

Belarta Konkurso 1953 : Prozo Originala

Jolanthe Leser

Dua Premio

La Limo

INTER la arbopintoj de la malhela, densa arbaro aperas kaj ĉiam pli alten ŝoviĝas flavkolora, varme brilanta suno. Milojn da akraj radioj ĝi ĉiudirekte ĵetas sur la teron dormintan ĝis nun en vintra rigido.

Vaste malfermitaj estas la fenestroj de la soleca domo, kiu staras meze en la kampoj. Petolemaj sunradioj glitas en la ejojn, en kies anguloj ankoraŭ spiras malvarmeta blovo de la pasinta sezono.

La vidvino Burgler staras sur la pordosoĵlo de sia domo kaj manŝirmante la okulojn ŝi ĉirkaŭrigardas en la pejzaĝon. La blanka ŝafisthundo Puli kuradas en la malgranda antaŭĝardeno, saltas al la jupo de sia sinjorino, terenĵetas sin, multfoje turniĝante kaj bojante, kvazaŭ ebria de ĝojo kaj bonhumoro.

“Nu, nu, frenezuleto”, murmuras Anna Burgler, “sufiĉas jam, sidiĝu !” Sed ŝi ridetas kaj ŝia malmola, laborkutima mano karesas la kapon de la saltanta besto.

Belega estas hodiaŭ ! La unua vere printempa tago ! Kvazaŭ io moviĝus sub la tera kovrilo, inter la senornamaj arbustbranĉoj kaj en la aero mem. Birdovoĉoj pepadas ĥore, la milde blovanta venteto alportas serioze tintantajn sonojn de la vilaĝa preĝejsonorilo kaj ĉio estas trafluata de la saniga, promesoplana, printempa suno . . .

De post jaroj Anna Burgler tute sola loĝas en la domo, nur kelkajn centmetrojn malproksime de la najbarlanda limo. Inter ĝi kaj ŝiaj kampoj troviĝas neuzata, seka terpeco kaj malantaŭ tiu terpeco

leviĝas alta dratplektaĵo, interrompita kelkloke de dikaj ferfostoj kaj danĝerigita de kaŝitaj minoj.

De post kiam la najbara lando starigis la malamikan barilon, konstruis altan turon, el kiuj gardistoj tage kaj nokte observadas ĉiudirekten, ĉu ne rampas ie elĉerpita, laŭte spiranta homa korpo, kiu sopiras iel atingi la transliman arbaron de la libera lando—depost tiam neniu helpantino volas resti longdaŭre ĉe la kamparanino Burgler.

“Kial vi ne venas en la vilaĝon, Anna ? Ĉiuj el ni volonte akceptus vin. Pro kio vi restas tie, viaj edzo kaj filo sen tio ja ne venos plu—Dio benu ilin ambaŭ, la bonajn homojn—vi estas freneza, Anna, vere !” Tiel la vilaĝaninoj kapskuante parolas al ŝi.

“Hodiaŭ nokte denove krevis mino, ĝia bruo vekis nin en la dormo, ni tuj pensis al vi ! Ĉu estis fuĝanto aŭ nur iu besto ? Oni diras, ke malgranda tuŝo al kaŝita drato sufiĉas por eksplodigi tiujn diablaĵojn”.

Anna Burgler hezite levas la ŝultrojn kaj nur silentas. Kiel klarigi al la aliaj la kaŭzon de ŝia persista restado malgraŭ la kelkfoje leviĝanta timo de ŝia batanta koro ? Labori la vidvino Burgler povas, pli multe kaj akurate ol du viroj—sed paroli, vicigi la vortojn en orda, rondigita klarigo, pentri la sentojn, esperon kaj kredon de sia interno ŝi tute ne kapablas. La soleco en la naturo formas la homojn vortŝparemaj. Ŝi sen tio en antaŭaj tempoj ankaŭ ne multe parolis. Ŝia edzo, Jozefo, agis same ; li nur ridetis kontente, senvorte

fumadis sian pipon kaj direktis palpebrumantajn rigardojn al Anna. Ili komprenis unu la alian sen multaj vortoj, sed kiel paroli pri tiaj aferoj kun aliaj homoj?

Je la rikolttempo, kiam helpantoj venas al ŝi—nur unufoje en la jaro, por plenumi kamaradan devon al la solvivanta virino—ili diras jam frumatene: “Sur tiu lasta kampo ni ne plu laboros, ĝi troviĝas tro proksime al la barilo. Vere, Anna, ni miras pri via kuraĝo. Vidu, ankaŭ familio Lux transloĝiĝis kaj konstruis novan dometon. Ili ne restis en ĉi tiu danĝera regiono”.

Anna respondas ion en la senco, ke la homo al ĉio povas kutimiĝi. Interne ŝi pensas: Ĉu mi povas kunporti sur mia dorso nian solan trezoron la fruktodonan kampon? Ĉu Jozefo ne prave riproĉos min, se li revenos? La posedaĵon de niaj praavoj ja iam heredos nia filo. Ĉu mi ne estas devigata labori por ili? La blanka slipo, kiu alvenis etan tempon antaŭ la militfino, anoncanta, ke Jozefo Burgler “falas sur la kampon de la honoro”, ĉu ĝi valoras ion, de post kiam oni tie kaj tie tute konfirmite aŭdas, ke mortanoncitaj viroj fakte tamen revenis? Ĉu ne ankaŭ tiu letero povis esti eraro?

En antaŭaj tempoj, laborante tute ĉe la limo, ŝi ofte parolis kun anoj de la najbarlando, disigitaj de ŝi nur de mallarĝa, murmuranta rivereto. Aŭ, se ili ne komprenis sin lingve, ili mansignante interkonsentis pri la vetero kaj la boneco de la greno. Milito kaj la postmilitaj tempoj ŝanĝis la aspekton de la mondo, starigis barilojn inter landoj kaj koroj. Sed la suno de Dio same radias al ĉiu estaĵo, enplektiĝas inter la arbobranĉoj same, kiel inter la drataj maŝoj de la barilo.

Kaj Karlo, la filo, kiu troviĝas ankoraŭ en militkaptitejo, li baldaŭ povos reveni per iu transporto. Estas vere, ke li jam de post longa tempo ne skribis, sed eble perdiĝis leteroj aŭ li ne povis skribi. Li certe same pensas al ŝi, kiel ŝi sendas siajn pensojn tra miloj da urboj, montoj kaj limoj ĝis li.

Ĉar estas grava kaj feliĉiga certeco de la homa vivo: por la plej grandaj valoroj de l'estado, por amo, kompreno kaj la pensoj, ne ekzistas malhelpoj. Nek montvaloj englutas ilin, nek bariloj disŝiras iliajn vaste malfermitajn, delikatajnflugilojn. Ili ŝvebas super ĉiuj pintoj, kontraŭstaras pafojn, barojn, kruelon kaj venkas distancojn. Por ili ne ekzistas limoj . . .

Proksimume tiaj pensoj trakuras la cerbon de Anna kaj tuŝas ŝian internon, nur en pli simpla maniero. Ĉar ŝi povas profunde senti, sed ne estas donacite al ŝi pensi en vortklara formo. Ĉu tio domaĝas? La valoro de la pensoj kaj vortoj ne dependas de ilia esprimkapablo, nur de la forto de iliaj enhavo kaj kredo.

La vilaĝaninoj ofte opinias, parolante pri Anna Burgler, ke ŝi estas bedaŭrinda, ĉar ŝi ankoraŭ kredas, ke ŝiaj viroj revenos. Eble la okazaĵoj, la longa soleco kaj la multaj, ŝarĝaj laboroj faris ŝin stranga kaj konfuzis iom ŝian konsciencon? “Lasu ŝin, ŝi estas feliĉa en tiu kredo”, diras la unua. “Oni devus klarigi al ŝi, ke Jozefo fakte mortis, kaj la revenon de ŝia filo oni ankaŭ jam devas pridubi. Ŝi ja povus edziniĝi denove kun brava viro”, proponas alia.

Impresite de ŝia sintenado kaj laborforto ankaŭ la viroj ofte babilas pri ŝi, sidante ĉe la kutima dimanĉa antaŭtagmeza biertrinkado. “Ĉu vi jam vidis? Dumvintre ŝi mem

pretigis bretojn kaj riparis la malnovan ĝardenbarilon.” diras la bakisto. “Ŝi estas vere kapabla virino”, kapjesas ruĝvanga kamparano.

“Ne mia gusto!” kokkrivoĉe kontraŭparolas la ŝuisto. “Ŝi estas tro serioza, kaj krome malgrasa”.

“Ho, la vinberoj eble pendas tro alte”, ridas la vilaĝestro. “Ĉu vi ne vizitis ŝin kelkfoje en la intenco trovi en ŝi novan kunulinon por via vidviĝinta mastrumado? Eble tial ne plaĉas al vi, ĉar vi vane kùris tien, he?”

Laŭta, ĝenerale ridado eksonas, en kies bruo sufokiĝas la embarasaj, koleraĵoj klarigoj de la ŝuisto.

Jes, ofte venas senedzinaj viroj por viziti Anna. Dece ili parolas unue pri la vetero, laŭdas la molan, bongustan panon, trinkas de la dolĉa pommosto, kiun ŝi gasteme prezentis al ili. Poste ili aŭ ŝercas, aludante ŝian vidvinan solecon, aŭ rekte demandas, ĉu ŝi ne volus veni en ilian domon kiel nova edzino—ĉiu laŭ sia naturo.

La virino respondas ĉiam same: Si ja ne povas disponi, eble baldaŭ revenos Jozefo aŭ Karlo. Ne, ne, ŝi neniam farigos en la urbo oficiale la mortateston de sia edzo. Ŝi glatigas per sia granda, kala mano la tablotukon, kaj faras malcertan geston, kvazaŭ ŝi dezirus pli da spaco inter si kaj la parolantoj.

Estiĝas ankaŭ ĉiam pli granda distanco inter ŝi kaj la varbantaj viroj. Anna Burgler tamen ne sentas sin soleca. Ŝi laŭte babilas kun Puli, murmurante ŝi interkonsentas pri dubindaj faroj kaj laboroj kun Jozefo kaj tute ne sentas la unuflankecon de la rilato. Je altaj festotagoj ŝi agas eĉ iom strange. Ŝi metas blankan tukon sur la tablon,

pretigas tri telerojn kaj seriozmiene rigardante la du neuzatajn lokojn ŝi manĝas malrapide kaj enpensiĝante.

Tia estis kaj estas de post jaroj la ĉiutaga vivo de la kamparanino Burgler. Vintro sekvas aŭtunon, printempo venkas la frostajn, malafablajn tagojn . . .

Kaj nun denove fariĝis printempo. Lumas la unua, belega tago, kiun ŝi rigardas, starante sur la sojlo de sia dompordo. Ŝi komprenas la laŭtan petolon de Puli, ankaŭ ŝin ebriiĝas iom la delikataj odoroj de la promesoplena tago. Baldaŭ la tero postulos novajn prilaborojn, ŝi devos plugi, semi, observi la kreskaĵojn. Je tiu penso ekmoviĝas en ŝi la pulsado de ŝia sana, laborĝoja sango.

Ŝi prenas fosilon, kaj malfermas la pordeton de la ĝardenbarilo. “Venu, Puli, ni rigardu, kia la tero ĉijare aspektas. Ne kuru for, vi ankaŭ jam ne estas la plej juna, vi nur ŝajnigastion, friponeto!”

Ridetante kaj de tempo al tempo albabelante la beston kurantan ĉirkaŭ ŝiaj piedoj, Anna Burgler trapaŝas la kampojn. Kelkloke ŝiaj pezaj ŝuoj malleviĝas en la moliĝintan teron, aliloke la tero ankoraŭ kontraŭstaras la kisojn de la suno. Ĉi tie ŝi rigardas la saltetantajn paserojn, elfosas terbulojn, sub kiuj rampas dikaj vermoj, tie ŝi pluiras kaj denove fosas. Ŝiaj okuloj kontente brilas. Kiel grasa kaj malhela montriĝas la tero! Jam la fortaodoro ĝia promesas fruktodonan sezonon. Estasodoro, kiun ŝi bone konas kaj diferencigas de ĉiuj aliaj odoroj de la naturo.

Puli flarserĉas en la sulkoj kaj konstante kuradas jen antaŭen, jen malantaŭen. Subite ĝi ekvidas leporeton, kiu timsaltante antaŭ la granda, blanka estaĵo kuregas



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***La bapto de Caro Vladimir**, de Karl Havliček Borovsky. Legendo el la Rusa historio. El la ĉeĥa esperantigis Tomáš Pumpr. Stafeto-libro n-ro 2, 140 paĝoj, 22.5 × 16.5 cm. Prezo 11 ŝil., afranko 6p.

Vidante la libron cititan, mi revidas tuj alian: “La Aventuroj de la brava Ŝvejk dum la Mondmilito”. La kaŭzo estas, ke ilustris la supran libron la sama artisto Josef Lada.

Havliček agitadis kiel talenta ĵurnalisto en la epoko de la “printempo de Nacioj”, 1848, por la emancipo de la ĉeĥa nacio. Aparteninta al la grupo de eminentaj ĉeĥoj, kiuj laboris por sendependiĝo en la kadro de la estinta monarkio, Havliček iĝis suspekta kaj la nigre-flava reakcio lin persekutis. Ekzilita al Suda Tirol, Brixen (nun Bressanone), Havliček ironie priskribis tiun ĉi epizodon en la “Tirolaj Elegioj”, kvarliniaj versaĵoj mordantaj.

Konsilo al leganto de la supra verko: Unue legu la “komentojn” je la fino de la libro, poste gustumu la versaĵojn. Kiu tion faris en la originalo aŭ en nacilingva traduko, konstatas kun efektiva kontentiĝo kiom multe kapablas nia lingvo fidele transdoni tion, kion volis diri aŭtoro. Necesas je tio ankaŭ talenta interpretisto kaj tion oni povas diri senrezerve pri samideano Pumpr. Eĉ se oni ne tre inklinas je tiu ĉi

tendenca literaturo de epoko forgesita, oni profitas pro la lerteco vere ĵonglista de la tradukinto. La internaj rimaĵoj multrilate korespondas al la ĉeĥa originalo; gustumu aron da ekzemploj, de komenc-linioj: Mi matene devas *pene* / Noktfantomojn kaj demonojn / La ekstaro de l’homaro / Nur se *pikoj* de *formikoj* / Preĝoj *svarmas* kaj *alarmas* / Doni sanon kaj infanon.

Kaj de kompletaj strofoj:

La ekstaro de l’homaro,
aĥ, ĝi kaŭzas servojn !
La lamento de l’homgento,
ŝiras miajn nervojn !

kaj :

Doni sanon kaj infanon,
panon por satmanĝi ;
ke fabrikoj ĉesu ŝpini,
devus Di’ aranĝi.

Plie :

La vetero estu varma
kaj samtempe frosta,
la sekalo estu kara
kaj malmultekosta.

Por atingi kelkfoje rimon, la tradukinto devis uzi novajn vortojn, sed pro tio li rajte povas alvoki la “poetan licencon”. Pri preso plaĉa plezuras libroamanto. Same la eldoninto kiu kuraĝe prenis sur sin tiun ĉi riskon, certe kompensotan per la disvendo rapida de la amuza libro.

Jirí Sedláček.

Biblioteko de Amo-Akademio. Serio de 4 libretoj (ĝis nun) kiuj pritraktas la religion Amoismo. Ĉi tiu ŝajne havus intereson ne nur ĉe Esperantistoj kiuj ankoraŭ ne havas firman konvinkon pri sia religio, sed ankaŭ ĉe tiuj, kiuj akceptis la Kristan aŭ Budhan kredon. Bele presitaj kajeroj 18.5 × 13 cm. haveblaj ĉe S-ro Kotohiko Macubara, Tenmori, Kôzôji Higaŝikasugai, Aiĉiken, Japanujo. Tiu samideano mem verkis n-ron 3, la ceteraj estas liaj tradukoj. 1. La Sankta Skribo de Amo (22 pĝ.) 2 rpk. 2. La Sepa Kandelingo (14 pĝ.) 2 rpk. 3. La Saiin-Monaĥejo de Amo (52 pĝ. ilustrita per 9 fotoj) 5 rpk. 4. La Blanka Lilio (16 pĝ.) 2 rpk.

La Tendo de la Junulo. Geraldo Mattos. Eld. Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Ltda., Rio de Janeiro, Brazilo. 18 pĝ. broŝ., prezo ne montrita.

La versaĵoj en ĉi tiu libreto apartenas al nuntempe multe favorata moderna skolo. La ĉeftemo trafos la animon de ĉiu pensema Esperantisto—la fervoraj sentoj de Zamenhof iom antaŭ eldoniĝo de la unua libro pri la Internacia Lingvo. Ĉar Geraldo Mattos estas nur 21-jara ni povas konfide antaŭvidi pluajn verkojn de lia plumo kaj pluan disvolviĝon de lia stilo.

La Akvokatastrofo, Tekstaro de la Filmstrio. Eld. Esperanto Film-Grupo, Antwerpsestraat 45, BERGEN OP ZOOM (Nederlando). 40 paĝoj ŝablonitaj 13.5 × 21 cm. \$2.00 aŭ 15ŝ. inkluzive de la filmstrio.

Ni ĝis nun vidis nur la tekstaron de ĉi tiu filmstrio; juĝi la plenan meriton de la subjekto sub tiaj kondiĉoj estas tute neeble. Tamen,

certe estas, ke leviĝas pli ol 74 malmulte konataj faktoj el la tekstoj por tiu sama nombro da bildoj—faktoj pri la sciencoj socia, inĝeniera kaj aliaj, kiujn kunligas la tragedio de la inundoj en Nederlando je la komenco de la pasinta jaro. Grupestroj ne forgesu, ke filmstrioj estas utilaj ne nur interne de la grupoj sed ankaŭ por ekstera propagandlaboro kiam la striojn akompanas detalaj kaj fidindaj tekstoj. Pri tiu lasta punkto bone zorgas la Esperanto Film-Grupo.

Ni ne povas silenti ! Eld. Esperanto-Kenkjuŝa, 87 Matuba, Miya-tyo, Aiti-ken, Japanujo. 13 × 18 cm., 40 p., broŝ. Prezo 3 rpk.

Tiu broŝuro konsistas el raportoj pri postatombombaj malsanoj, preparitaj por la Internacia Kuracista Kongreso en Italujo, kie la tutmonda medicinistaro decidis kunveni en Oktobro 1952. Bedaŭrinde la kongreso estis subita malpermesata. Do, la aŭtoroj, tri eminentaj sciencistoj, ĉiuj fakuloj pri radioterapio kaj atomesplorado, esperantigis siajn raportojn por disvastigi ilin tia-maniere.

La artikoloj detale kaj senemocie priskribas la influon de la atombombo al la homa korpo. Tio elvenas el tri diversaj kaŭzoj: la varmego, la meĥanika forto kaj la radio-aktiveco, la lasta estante la plej timiga, ĉar neniu rimedo estas ĝis nun eltrovita por ĝia kuracado. La priskribo de tiuj malsansimptomoj kaj krome la esploro, kiun la kuracisto mem faris rilate la influon de radio-aktiveco al la propra sango, devas interesi ĉiun mediciniston, ĉar ĝi estas la unua tiaspeca sperto.

Bedaŭrinde la aldonitaj fotografaĵoj ne estas tre klaraj.

E.W.



39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion—7-a aŭguston 1954

N-ro 6

OFICIALA KOMUNIKO

Marton 1954

Pagoj : Al Rotterdamsche Bank, Haarlem, al Poŝtgirkonto 604997 kaj al Perantoj en diversaj landoj. L.K.K. akceptas pagilojn ŝanĝeblajn en banko sed absolute ne povas akcepti varojn aŭ librojn kiel pagon. Sendu Aliĝilojn, Mendilojn kaj pagojn al la sama instanco : ĉu L.K.K., ĉu peranto.

Grave : Por eksterlandaj ĉekoj la banko postulas makleron de guld. 0.50. Preskaŭ neniu ĝis nun aldonis tiun sumon (=2 rpk.).

Mendoj : Kvankam la Dua Bulteno kaj Instrukcioj pri mendoj estas en kiel eble plej simpla lingvo multaj faras erarojn. Ŝajnas, ke oni ne legas la instrukciojn. Erarajn kaj fuŝitajn Mendilojn la L.K.K. resendas. *Ne antaŭpagu loĝadon kaj ekskursojn.*

Programo : Iuj ne mendas la matenajn ekskursojn ĉar ili ne scias la programon. Ankaŭ L.K.K. ne scias ĉar ĝi estas difinita nur je Pasko. Tamen preskaŭ certe oni povas kalkuli pri la jenaj : lundon matene : Kunsido de U.E.A. ; lundon ptm. : Labor-kunsido ; mardon matene : Labor-kunsido ; mardon ptm. : fakaj kunvenoj ; merkredon matene : Bel-artaj Konkursoj ; merkredon ptm. : Oratora Konkurso ; vendredon matene : Kunveno de U.E.A. ; vendredon ptm. : fakaj kunvenoj, Akademio.

Junulara Programo : Evidentas, ke

granda nombro de gejunuloj inter la aĝoj 6 kaj 16 jaroj partoprenos la kongreson. La L.K.K. tial okupiĝas pri diversaj programeroj speciale por tiuj junuloj. Tio verŝajne enhavos vizitojn, ekskursojn, distraĵojn. Detaloj sekvos.

Adresoj : Kelkaj poŝtaĵoj revenis kun indiko "Nekonata". Bonvolu tuj sciigi al L.K.K. en okazo de adresa ŝanĝo.

Bultenoj : Ne aperos nova bulteno. La venonta dokumento de L.K.K. estos la Kongresa Libro (nun en preparo). Espereble ĝi atingos ĉiun aliĝinton frue en junio.

Limdato/Limcifero : L.K.K. denove atentigas pri la limigo de partopreno en la kongreso. La maksimuma partopreno en la kongreso estas 2000 kaj kiam tiu cifero estos atingita L.K.K. rezervas al si la rajton rifuzi pliajn aliĝojn.

Statistiko : Aŭstralio 1, Aŭstrujo 12, Belgujo 50, Brazilo 3, Britujo 231, Danujo 53, Finnlando 31, Francujo 188, Germanujo 188, Hispanujo 16, Indonezio 1, Italujo 50, Japanujo 1, Jugoslavio 68, Kanado 4, Madejro 1, Meksikio 2, Nederlando 471, Norveg-ujo 70, Novzelando 11, Portugalujo 7, Svedujo 143, Svislando 24, Turkujo 2, Usono 7. Sumo el 25 landoj 1635 (pasintjare 745) (Je 20-3-54 : 1940).

Mason Stuttard,

Konstanta Kongresa Sekretario.

Mason Stuttard :

Haarlem


HAARLEM estas tipe nederlanda urbo kun kelkaj specialaj trajtoj, kiuj stampas ĝin tamen samtempe unika. Tipaj estas la fasadoj de la domoj kaj la strangaj ŝtupogabloj tuj memorigantaj pri la mezepoko. Tipaj ankaŭ la grandaj fenestroj de la loĝejoj per kiuj oni havas enrigardon tra ŝajne senlime vastaj salonoj. Tipaj la miloj da bicikloj ruliĝantaj sur la ŝoseoj de la urbo kaj kun tipa filozofia rezigno la homoj atendas—piedirantoj, biciklistoj, aŭtoj, tramveturiloj — kiam ponto baŭme sin levas por preterlasi ŝipeton aŭ bargon sur kiu ofte flirtas multekolora tolaĵo de la “dom”-mastrino.

La urbo tamen estas juvelujo rara. Antikvaj artogemoj tie abundas, iafoje imponantaj per sia grandiozo antaŭ aliaj objektoj, iafoje modeste sin kaŝantaj en placeto aŭ ia nenion-avizanta strateto.

Karakteriza de la nederlanda arkitektura stilo de la mezepoko estas

la pleba Viandvendejo sur la ĉefa placo, renesanca juvelo sen egalo en la lando. Apud ĝi grandegas la preĝejo de Sankta Bavo—patrono de la urbo—kies grizajn murojn neniel difektis la morda dento de la tempo, sed kiuj kontraŭe akiris novan belon kun la paso de la jaroj. Trankvilaj oazoj en la trafikplena urbo estas la “hofjes”, kortetoj de maljunulaj dometoj, videbla atesto pri la filantropio de generacioj jam longe forpasintaj. Tie en la krepusko de la vivo la malpli bonŝancaj povas pasigi siajn tagojn en paco kaj kvieto en propra hejmo, kie ilin atingas la bruo de la urbo nur kiel obtuza murmuro de fore muĝanta maro.

La mallargaj stratoj viglas je trafiko, plejparte bicikla. Zorga atento necesas sur la tre malvastaj trotuaroj. Fremdulo povus supozi, ke la nederlandaj beboj naskiĝas kun embrio de biciklo ĉar en la praktiko tiu aparato, maŝino, instrumento—nomu ĝin kiel ajn—efektive iĝas



La Provinca Domo (Iama restadejo de Ludoviko Napoleono)

etendaĵo de la homa anatomio. Nur staru ĉe vojkruciĝo kaj miru je la lertaĵoj de ĉi tiu gento de “radhomoj”. Simpla pasaĝero sur biciklo—ĉu antaŭ ĉu post la rajdanto mem—estas bagatelo. Sepjara bubo lerneja tion kapablas. Vidu tamen patrinon kun sia familio iel sin kroĉanta al ŝi kaj al la maŝino! En aliaj landoj geamantoj sopiras nenion tiel multe, kiel izolan benkon en la parko; sed ĉi tie . . . nenion tiel banalan! Geamantoj fervore sin brakumante pelas sin antaŭen kun la rigardoj interkroĉitaj, frustrante al si la dolĉajn neniaĵojn konvenajn je la momento. Kvazaŭ tio ne sufiĉas, povas okazi en la Hout (arbara parko sude de Haarlem) ke preterpasas juna paro *sur du bicikloj* en la sepa ĉielo de feliĉo kun la lipoj kvazaŭ nedisigeble kungluitaj! Kaj la piedoj ritme turnas, turnas, turnas la radojn, pelante ilin antaŭen en la rozkoloran estontecon de la junaĝo . . .

La butikoj krevas je varoj kaj la vendistoj ĉi tie havas tute apartan talenton je “vestado” de siaj montrofenestroj. Kiel oni povas atendi, la enlandaj produktaĵoj pompas: fromaĝoj de ĉiu speco kaj de ĉiu formo kaj preskaŭ de ĉiu koloro! Stranga fenomeno tamen. En lando tiel riĉa je lakto-produktaĵoj butero relative malofte videblas en la butikoj ĉi tie. Je demando, kial la homoj tiel multe uzas margarinon—cetere tre bonkvalitan—venis la respondo: eksporto de butero al Britujo! (tuta senaplombiĝo de unu K.K.S.!!).

Promenante tra la stratoj oni iafoje povas aŭdi gajan, preskaŭ kermesan, muzikon. Esploro malkovras gurdon. Sed kian gurdon! Masivan instrumenton multekoloran, kies latunaĵoj kaj pentritaj figuroj brilas kaj vulgaras kiel karuselo. Ĝia metala voĉo saltigas la piedojn je danco, sed

iel ne kongruas kun la atmosfero en iuj el la dignaj respektindaj burĝecaj stratoj de Haarlem.

Ĉe stabila kaj solida popolo oni atendas solidan menuon. Tiel estas ĉi tie. Multas la legomoj en la manĝoj. Ili kreskas abunde en la nederlanda grundo, kiu—kiel ĉe la fruktoj de ĉi tiu lando—donas al ili tute apartan guston kaj kvaliton. Frandaĵo estas la cikorio, kies amara gusto tamen ne sidas agrable sur ĉies palato. Tio estas gusto akirita. Altan ŝaton sentas la Haarlemano por la multaj marinaĵoj de fiŝo, kiujn oni povas aĉeti en preskaŭ ĉiu strato en la urbomezo en diversaj malgrandaj budoj. Estas interese, kiel diversas la gustoj kaj la manieroj en diversaj urboj: Munkeno, rostitaj kolbasoj; Oslo, kolbasoj kuiritaj en akvo; Zagreb, rostitaj kaŝtanoj. Krome en Haarlem, en malvarma vespero apetitige trafas la nazon laodoro de “patates frites” (frititaj terpomsplitoj) nostalgie revekanta la memoron pri norda Anglujo. Tamen apud la vendejoj de pli solidaj varoj troviĝas surprize multaj butikoj de frandaĵoj—ĉokoladoj, bonbonoj, marcipanaĵoj kaj bakaĵoj, kies nura aspekto vokas en la buŝon la salivon. En neniuj aliaj landoj oni vidas tiom da dolĉaĵoj. Ĉi tiu certe estas frandema popolo, kiel pruvas ankaŭ gastado en hejmo Haarlema.

En unu rilato la homoj parenkas al la norvegoj—en la pasio por diskretaj flavaj lumoj en la hejmo. La loĝantoj de ĉi tiu urbo prave ne hontas pri siaj hejmoj kaj vespere en la salonoj—tute ne kaŝitaj per kurtenoj—la varmaj tonoj de pluraj lumpunktoj riĉe nuancigas la bildon por hazarda enrigardanto, multekoloran bildon de solida komforto kun iom peza eleganto. Brilas antikvaĵoj el kupro

kaj latuno. Olepentraĵoj peze pendas, kaj tradicia ruĝa-bruna tapeto kun brodaĵoj eventuale faras malhelan makulon sur la muro super divano.


Kanaloj retas ĉie en la urbo kaj sur ili en somero, precipe en dimanĉoj, videblas junuloj en kanotoj ĝuante la maksimumon de diverso kaj intereso per ĉi tiu nekomparebla maniero vidi la landon. Antaŭen ili padelas laŭlonge de stratoj, kies fasadoj ilustras la ŝanĝigantajn gustojn de la urbo—kvazaŭ transversa tranĉo tra la epokoj—kaj preter ĝardenojn de burĝaj domoj kolorplenajn kiel paletro de moderna pentristo.


Kiel “ĉefurbo” de la regiono por la kultivado de la florbulboj Haarlem mem estas speco de ĝardena urbo. La multaj ĝardenoj kaj verdaj “pulmoj” donas senfinan ĝojon al promenanto. Floroj efektive orgias sur la stratoj — en la ĝardenoj, parketoj kaj en la fenestro-skatoloj de la domoj. Simile al multaj aliaj nederlandaj urboj Haarlem havas

sian parkon por arbaraj cervoj, kien sin direktas tre volonte la infanoj (kaj ŝajne ne malpli volonte ankaŭ la gepatroj !) por nutri la delikatajn bestojn, kiuj vere ne estas satigeblaj. En tiu trankvila parko—de Hout—facilas kaŝi sin for de la bruoj de la urbo en la daŭro de du-tri minutoj kaj en la malvarmeta ombro de la grandaj fagoj, kverkoj kaj platanoj forspiri sian lacon laŭirante la vojetojn, kiuj ĉie labirintas ; kaj solaj kunuloj estas diligente maĉanta sciuro, preta tamen je la plej eta movo salti sur la plej proksiman arbon, arbaraj kolomboj rukulantaj inter herbo aŭ sur branĉoj, kaj hazarde timigita merlo kiu saltas kaj proteste insulte forflugas tra la foliaro al sekuro.

Haarlem estas “intima” urbo kaj vizitanto preskaŭ tuj sentas sin hejme. La urbanoj volonte helpas al fremdulo kun la vera ĝentileco de homoj civilizitaj, kaj tio ne estas nura formalaĵo por la hazarda gasto, klopodo krei favoran impreson, sed vera sentimento de “bona najbaro”.

La malnova Konsilantara Salono. Nuntempe salono por edziĝaj ceremonioj.





Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	18.30–19.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 12-IV). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.30	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Jugoslava Radio. Okaze de la 38a Universala Kongreso, la stacio Zagreb komencis Esperantlingvan ĉiusemajnan elsendon, kiu ĝis nun daŭras. La ricevo de ĉi-tiu programo estas bona en Centra Eŭropo kaj landoj de Orienta Mediteraneo ; same bona en Okcidenta Eŭropo per riceviloj de supera klaso ; mezbona per ordinaraj aparatoj. La horo de la dissendo estas favora al facila aŭskultado per mezlonga ondo.

Radio Roma. 2-IV, Leterkesto kaj bibliografio ; 7-IV, Novaĵoj el Italujo ; 9-IV, Sassari, urbo de la 26a Itala Kongreso ; 14-IV, Memore al D-ro Zamenhof ; 16-IV, Sankta Vendredo ; 21-IV, Naskiĝo de Romo ; 23-IV, Itala belarta urbo Assisi ; 28-IV, Gajaj italaj kanzonoj de la 4a Festivalo ; 30-IV, Leterkesto kaj bibliografio.

J. Régulo-Pérez :

Kazoj en Esperanto

SAMIDEANOJ, kies gepatraj lingvoj havas rimedojn por distingi gramatikajn kazojn, de temp-al-tempo starigas demandojn koncerne la kazon, kiun oni devas uzi por komplementi tiun aŭ alian verbon. Fine de 1953, sur la paĝoj de *La Progresanto*, aperis eksplikado pri tiu punkto fare de kompetentuloj el nia movado. Ŝajnas al mi, ke la pli bona, pli esperanta doktrino troviĝas en la vortoj de S-ro Butler (*L.P.*, 1953, p. 78). Okaze de lia trafa klarigo, juketis min deziro interveni, eĉ se verdire, mi aldonos nenion esence novan al la argumentado de nia eminenta akademiano, kaj mi faros nur alifrazan taŭtologion.

* * *

Kio estas gramatika kazo? *Kazo* estas gramatika rimedo, kies rolo estas esprimi rilaton inter substantiva koncepto kaj alia vorto aŭ frazo, el kiu ĝi (la substantivo) konsistigas parton. En la hind-eŭropaj lingvoj kaj en Esperanto la kazoj kutime dependas de: (a) verbo, (b) substantivo aŭ (c) prepozicio. Jen:

- (a) *ŝati mielon*
- (b) *kies patro*
- (c) *al rivero*
en riveron

Kutima karakterizilo de kazoj estas abstrakta sufikso, kiu gluiĝas jen al radiko nuda (ki-es), jen al plena vorto (esperanto-n). Kazon oni povas ankaŭ signi per manko de karakterizilo, t.e. per karakterizilo *nulo* (pano-[]).

Ĉar Esperanto havas neŝanĝeblan bazon, nome la Fundamento, tie devas solviĝi ĉiuj duboj. Nu, la

Fundamenta Gramatiko diras: "Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo . . . La ceteraj kazoj estas esprimitaj per helpo de prepozicio". El ĉi tiu lasta aserto Kalocsay kaj Waringhien (*Plena Gramatiko*, dua eldono, Budapeŝto 1938, p. 164), pro oportuno, tiris la nomon *prepozitivo* (ŝajne imitaĵo el la rusa gramatika lingvo) por ĉiu vorto, kiun antaŭas prepozicio. Ĝis tie ĉi la ekspresa parto de la Fundamento. Tamen implice la Fundamento enhavas krome la *es*-kazon (genitivo), kiu rolas en la Tabelo (ĉiuj *es*-finaĵaj vortoj) kaj en analogiaj formaĵoj: *ali-es*, *kelk(i)-es*, *mult(i)-es*, *malmult(i)-es*, *plur(i)-es*, *cert(i)-es* . . . Eble estonte oni povos paralele al *de* (la) *patro* uzi la formon *patr(i)-es*: *patres libro=libro de (la) patro*. Malfundamenta ĝi ne estus; nur novplua evoluaĵo de plia esperanta virtualo.

Laŭ la Fundamento kaj laŭ tiu supra gramatika ekskurso, Esperanto havas do nur tri kazojn:

nominativo: *vino*

akuzativo: *vinon*

genitivo: *nenies* (aplikebla, ĝis nun, nur al la Tabel-vortoj kaj al kelkaj similaj).

Pro oportuno oni povas apliki la nomon *prepozitivo* al ĉiu substantiva koncepto antaŭita de prepozicio: *al rivero*, *de rivero*, *per rivero* . . . Sed propre prepozitivo ne estas kazo en Esperanto.

Tamen tie kaj tie oni trovas en la Esperanta literaturo la nomojn *dativo*, *vokativo*, *ablativo*, k.t.p. por rilatoj inter Esperantaj frazelementoj. Tio estas nur naci- aŭ klasik-lingva influo, sed ja io fakte fremda al

Esperanto, laŭ la Fundamento kaj la lingva tradicio.

Eŭropo, dum la lastaj du jarmiloj, estis sub la skola influo de la latina gramatiko, kiu ja havas ses tradiciajn kazojn. Danke al ties skola influo—kaj enfluo !—sur la gramatikojn de la romanidaj kaj slavaj lingvoj, ĝis komenco de la 20a jarcento oni parolis en lernolibroj de la portugala, hispana, franca, itala, k.t.p. lingvoj pri ses kazoj, kvankam ĉe la romanidaj lingvoj, kun tre malmultaj esceptoj en fosiliaj idiotismoj, tute malaperis la kazaj karakteriziloj. Se, anstataŭ la latina, la skola ĉeflingvo estus estinta la helena, tiam certe oni parolus nur pri kvin kazoj, kun absoluta nescio pri *ablativo*, kiun la helena ne konis; kaj se la baza lingvo estus estinta la sanskrita, tiam nedubeble ni estus havintaj ok kazojn, kaj ni laŭtradicie kaj tute serioze—sed same mise !—parolus pri *lokativo* kaj *instrumentivo*. Ekster la hind-eŭropaj lingvoj, la baska, ekzemple, havas dek ses kazojn, inter kiuj troviĝas la belnomaj *mediativo*, *unitivo*, *sociativo*, *aditivo*, *destinativo*, k.t.p. El aliaj lingvogrupoj, ekzemple la finna-ugria, ni povus ankoraŭ riĉigi nian kolekton per *ilativo*, *inesivo*, *abesivo*, *adesivo*, *delativo*, *estivo*, k.t.p., k.t.p. Laŭ W. Wundt (*Völkerpsychologie* II, 2, 70), kelkaj kaŭkazaj lingvoj posedas 47 simplajn kaj 87 kunmetitajn kazojn . . .

Se Esperanto devas havi aŭtonomecon, memecon — kaj mi kredas, ke ĉiuj jesos—ni devas ĝin kulturi laŭ la Fundamento kaj laŭ nia lingva tradicio, nia *propra* tradicio. Ni ne devas forgesi, ke Esperanto estas tutmonda, ne nur eŭropa. Hodiaŭ oni ĝin perfortigas ĉerpe adaptiĝi al la t.n. kulturaj lingvoj, sed ĉi tiuj estas tiaj nur por

okcidentuloj ; en aliaj latitudoj la rusa, kun sep kazoj, havas gravan skolan valoron ; ankaŭ la ĥina, la japana, la araba, la indonezia rajte kaj prave povas postuli saman respekton. Kaj morgaŭ la lingvoj haŭsa kaj suaĥela, kiuj nun ekfariĝas neignoreblaj kulturaj faktoroj en meza kaj orienta Afriko, same rajte povus peti sian vicon. Nu, se Esperanto devus speguli la gramatikan teĵinaron de ĉiu vica kultur-lingv(ar)o, ĝi fariĝus nur labila vic-lingvo, neniam estus si mem nek povus sin nomi aŭtonomia idiomo. Ni estu do konsekvence laŭfundamentaj kaj fosu nian propran sulkon.

Kiuj ne respektas la Fundamenton kaj nian lingvan tradicion, precipe esprimitan en la Zamenhofa verkaro, tiuj estas malesperantistoj kaj malsamideanoj ; ili do kvazaŭ propravole ekziliĝas el Esperantujo, kaj iliaj agoj kaj diroj mem forŝvebiĝas el la sfero de niaj interesoj. Ili nin ne multe priokupu ; ni paciencu, kaj ni povos vidi, kiel jam plurfoje okazis, ilian fornebuliĝon, diseriĝon en nenion.

Verkoj por instruo de Esperanto en lingvoj, kiuj posedas ekzemple *dativon*, devas klarigi la manieron, per kiu Esperanto redonas tiun esprimformon, sed ne atribui al Esperanto *dativon*. Kiel estus malrekomendinde trudi al ĝi *ablativon*, pro tio, ke ĝin posedis la latina ; aŭ *lokativon* pro tio, ke ĝi troviĝas en la sanskrita ; aŭ *mediativon*, pro tio, ke ĝin kalkulas la baska ; aŭ *ilativon* pro tio, ke ĝin konas la grupo finna-ugria ; k.t.p., k.t.p.

Nu, do, kiel oni devas diri germanan *dativon*, latinan *ablativon*, baskan *mediativon*, k.t.p., en Esperanto ? Nur unu regulo : tiel, ke la senco de la esprimota ideo rezultu klare

komprenebla en nia idiomo, sen vundo aŭ mistordo de nia gramatiko (kaj spirito). Jen ekzemplo :

helenoj diris : *épion óinou* (*óinou* estas vorto genitiva)

francoj diras : *je bois du vin* (*du vin* estas prepozitivo)

esperantistoj diras : *mi trinkas vinon* (*vinon* estas vorto akuzativa)

hispanoj diras : *bebo vino* (*vino* estas vorto tute egala same en akuzativo, prepozitivo aŭ nominativo, ĉar rimedoj por distingi kazojn ne ekzistas en la hispana ; ĉi-okaze ĝi rolas kiel rekta objekto, danke al pozicia morfemo).

Jen kvar kulturlingvoj ; ĉiu, laŭ sia spirito, uzis apartan gramatikan rimedon por esprimi saman ideon. Estus absurde, sence, voli trudi al iu ajn el la kvar cititaj lingvoj la idiotismojn de la tri ceteraj. Kiam en Esperanto iu diras *mi trinkas vinon*, tiu parolas tute korekte, kaj valoras nenion, ke helenoj por esprimi tiun ideon uzis genitivan, francoj uzas prepozitivan (partitivon) kaj hispanoj sin helpas per pozitiva morfemo.

Cetere, la esperanta akuzativo estas neniel parenca, laŭ semantika rolo, al la klasikaj aŭ modernaj akuzativoj de la lingvoj, kiuj konas tiun kazon. En Esperanto estas samnatura la akuzativo de *mi iras Romon*, kiel tiu de *mi manĝas panon*, aŭ tiu de *sunroze koloras neĝon*, k.t.p. Fari distingojn inter ili kaj bapti tiujn distingojn per belaj helenaj-latinaj nomoj estas balastigi Esperanton, ĝin malespere ekrustigi, ekfosiliigi.

Resume : se egale klare, Esperanto povas kiel komplementon uzi akuzativon aŭ prepozitivan, sen-distinge ; kaj en kelkaj okazoj (ankoraŭ malmultaj) ankaŭ genitivan.

Sed notu bone : estas esperanta idiotismo la fakto, ke ne ekzistas ĝenerale fiksjaj reguloj por prefero de akuzativo, prepozitivo aŭ genitivo : ĉiu formo estas uzebla, se klara ; kaj se klara, ĝi estas ĝusta, ĉar la lingvo estas nur ilo por klare interŝanĝi ideojn inter homoj.

Fine, jen resumaj ekzemploj : Egale bonas, el *gramatika* vidpunkto, ĉiu el la tri subaj paralelaĵoj :—

1. *De kiu estas la libro ?*
Kies estas la libro ?
2. *Mi dankas al vi.*
Mi dankas vin.
3. *Mi instruas al vi Esperanton.*
Mi instruas vin pri Esperanto.
Mi instruas al vi pri Esperanto.

La frazon *pendigi la kanajlon la kapon malsupren*, bone komprenebla Zamenhofa idiomaĵo, certe multaj plurkazaj lingvoj ne povus klarigi per siaj delikataj terminaroj. Eĉ la disbranĉoj kaj memobloj ĉe la tradiciaj akuzativoj de la kadavraj latino kaj sanskrito, kiujn faras la nuna lingvoscienco, certe ne plene helpus por taŭge etikedi tiujn tri sinsekvajn esperantajn n-kazojn. Tamen ja Esperanto funkcias . . .

Nur amo al precizo aŭ al simpla ; nur stila motivo aŭ emfaza serĉo, aŭ similaj celoj, povas dikti kiam oni preferu akuzativon, prepozitivan, genitivan, la solaj kazecaj komplementoj, kiujn laŭfundamente Esperanto havas.


PREMIAJ ROMANETOJ

23 interesaj noveletoj diverstemaj
verkitaj de konkursintoj.

96 paĝoj aŭfrankite 1ŝ. 2p. aŭ 4 rpk.

Mendu ĉe U.E.A.

Enigma Konkurso N-ro 87



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 195 : Ĝemu kaj ploru sed ĝis fino laboru. arbitraĝo - kavalerio - diafragmo - apoĝaturo - gutaperko - geografio - najbarino - nekropsio - kartilago - akvilegio - glicerino - matrikulo - pleonasmo - marioneto - banderolo - oranĝerio - medaliono - pastinako - faksimilo - peritoneo - integralo - dekoracio - nostalgio - imperialo - biografio - kariofilo - frugilego - reputacio.

N-ro 196 : Komisii al komitato la kreadon de nova lingvo estus tiel same sence kiel ekzemple komisii al komitato verki bonan poemon. Esp. 1953, paĝ. 347.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 83-a konkurso : S-ro R. Iserentant (Belg) 143, F-ino L. v. Waldowski (Germ) 142, S-ro A. C. Coutinho (Braz) 135 p.

Enigmo N-ro 199 : AN-BE-ĈA (1), ĈO-DO-ES (2), FE-FO-GE (5), GA-GI-IN (7), IM-KU-KO (8), LA-LO-MI (11), NI (12), OK-OR-PE (15), RA-RI (16), RO-SE (20), TA-TI (25), UR (30), VO-ZE-ZI (33).

Per la supraj silaboj formu 19 trisilabajn vortojn. Ĉiu ĉi-suba numera difino estas la sumo de la numeroj, donitaj interkrampe post la silaboj. ekzemple la vorto "kukolo" estus difinita per $8+8+11=27$. Ĉiun silabon vi uzu minimume unu fojon.

La komencliteroj de la 19 vortoj laŭ la donita sinsekvo formas Zamenhofan proverbon.

La difinoj estas : 1 - 28, 2 - 37, 3 - 27, 4 - 32, 5 - 73, 6 - 51, 7 - 52, 8 - 48, 9 - 45, 10 - 36, 11 - 38, 12 - 41, 13 - 37, 14 - 19, 15 - 44, 16 - 56, 17 - 63, 18 - 51, 19 - 29.

Enigmo N-ro 200 : Reordigu la literojn de ĉiu kolono tiel, ke horizontale vi legas tri esprimojn el la Proverbaro de D-ro Zamenhof. En la lasta linio vi tiam legos vorton kiu esprimas la sencon de la proverboj.

E	A	I	K	I	O	R	A	T	D	O	R
E	I	O	K	O	S	O	N	N	O	C	N
S	N	S	L	D	T	P	I	I	K	G	O
A	O	A	T	V	A	P	K	E	O	N	O
K	N	M	K	A	N	N	I	N	E	O	L
R	F	N	P	I	A	G	O	I	K	T	E
N	A	I	I	A	A	L	L	R	A	K	I

Ambaŭ enigmojn ensendis S-ro A. G. Rickwood (Anglujo).

Korektoj

Esperanto, marta numero. Sur paĝo 73 enŝteliĝis grava pres-eraro. La indiko "19 geinstruistoj" devus esti "10 geinstruistoj".

Jarlibro, paĝo 107. La adreso de la Hotelo-Restoracio Fritz Matauscheck devus esti Breitenseerstrasse 14 kaj ne Breitenstrasse. Bonvolu korekti tion.

F. R. Banham :

Pri la Recenzado Esperanta

DEĖ OK jarojn mi ricevadis gazetojn el la tuta mondo.

En la normalaj jaroj ekzistis, se ne floris, proksimume 70 E-gazetoj, el kiuj mi, kiel redaktoro, ricevis ĉirkaŭ 20. Mia povo taksi la ĝeneralan gazetan literaturon tial estis nur parteca, limigita, kaj la sekvantaj rimarkojn vi legos kun tiu fakto en la penso.

Mia sperto estis, ke nur malofte oni povis tiutempe legi pensoriĉan, juste taksan recenzon. La nivelo estis malalta. Proksimume nur ses gazetoj vere penadis doni legindajn taksojn de E-verkoj. Regis ĉe la ceteraj nur rutinaĉaj laŭdetoj, stereotipaj ofte nesekvindaj rekomendoj. Aĉstilaj kaj gramatike eraraj presaĵoj pasis tro facile tra la manoj de mielbuŝe indulgaj redakcianoj, kiuj volis plaĉi al ĉiu trorapida eldonemulo. Inter la plej bona recenzuloj estis certaj kunlaborantoj ĉe *Heroldo de Esperanto*, *Literatura Mondo*, *British Esperantist*, *International Language*, *Esperanto*, *Franca Esperantisto* kaj *Germana Esperantisto*. La diroj de *British Esperantist* estis ofte pike trafaj sed ankaŭ tro mallongaj, sendetalaj. La jam de longe mortinta *International Language* enhavis tre valorajn recenzojn kaj libroanalizojn. Modelo ĝi estis ; ĝian ekzemplon saĝe imitus tiuj gazetoj posedantaj similajn paĝnombron kaj amplekson. La landaj gazetoj tro ofte plenigis la paĝojn per sekaj priskriboj pri temploj, naturaj belaĵoj, mezkvalitaj homfiguroj kaj naciaj negravaĵoj. Ĉu ne konsile iom lasi tion for, kaj anstataŭe donadi pli da meritita atento al signifaj verkoj en Esperanto

produktitaj je tiom da ŝvito kaj monofero ?

Gravaj verkoj, kiaj la *Esperanta Biblio*, la *Originala Verkaro de Zamenhof*, *Jarmiloj Pasas* kaj *La Leteroj de D-ro Zamenhof* ne ricevis sufiĉan atenton en la Esperantaj gazetoj. *La Infero* ricevis bonan recenzon en la itala organo, ankaŭ en *British Esperantist*, *La Pola Esperantisto* kaj *Esperanto* ; kaj pri *La Leteroj* verkis leginde iuj francaj Esperantistoj, kiuj mem vivis en la koncerna periodo, do sufiĉe interesiĝis recenzi kun efektiva vervo kaj penetremo. La *British Esperantist* ankaŭ bone traktis la verkon. Pri la *Biblio* : krom la Komitata Raporto, trafe kompilita, artikolo en *Esperanto* kaj la kompetenta studaĵo de Pastro W. J. Downes, M.A., B.D., en *International Language* (okt.-nov. 1927) preskaŭ nenio serioze leginda aperis pri tiu majstra traduko de Zamenhof. Eĉ la neesperanta gazetaro pli penetre diskutis la Esperantan *Biblion* en siaj kolonoj. Ekzemple *London Times*, 28 julio 1927 (cite en *International Language*, septembro 1927).

La duvoluma fortostreĉo, *Jarmiloj Pasas*, malgraŭ ke *Heroldo de Esperanto* varme petis por kompetenta, serioza konsidero flanke de la recenzantoj, ricevis la kutiman fluon da ventaj vortoj. Skizo de la ĉapitraj titoloj, eta resumo de la enhavo, rimarkoj pri la formato, teknikaj punktoj de la libro, nekritika admiro pri la imponeco de la provo kaj simila—jen ĉio. Krom tiujn de la nomitaj gazetoj, ni ne rimarkis ian konservindan studon pri tiu verko de

Haefker. Estis sincera kritiko de M. C. Butler en *British Esperantist* kaj kelke da linioj en *Internacia Pedagogia Revuo*, de kiu gazeto oni rajtus atendi pli bonan.

Pri la *Originala Verkaro* oni povas simile aserti. Ekster la internaciaj organoj ni notis nur tiun de la landa organo *La Progreso* (Ĉeĥoslovakujo), kiu entreprenis recenzon post reserĉlaboro konvena al la tasko. Pri la du verkoj de Remarque—*En Okcidento Nenio Nova*, kaj *La Vojo Returne*—Karl Minor pri la dua verkis tre longan recenzon en *La Germana Esperantisto*, kaj Nekrasov faris okkolonan pritrakton de *La Vila Mano* (Bulthuis) en *La Nova Epoko*. Ambaŭ estas bonaj ekzemploj por niaj supraĵaj banaluloj, ĉar la recenzoj montras la paciencon kaj akrevidemon necesajn ĉe tiu, kiu prenas sur sin la taskon taksu fidele kaj laŭmerite la pli gravajn verkojn en nia literaturo.

Stephen Andrew tradukis kun ekstrema sindonemo kelkajn verkojn de Shakespeare. Pri tiuj gravaj verkoj, kie nun, kun malmultaj esceptoj, ni povas rimarki la aman priatenton de gazetoj de la speco de la malnova *Literaturo*, kiun eldonis la Brita Literatura kaj Debata Societo en la 1920-jaroj? La germana organo *La Ponto* “dediĉis” kelkajn liniojn al la traduko de *Trojlo Kaj Kresida*. Ĉu la traduko de majstraĵo, kia verko de Shakespeare, meritas nur indiferentan mencion? Pri la dua eldono de *Faŭsto*, la *Malgranda Revuo*, *The Worker Esperantist* kaj *La Orienta Revuo* skribis konservindaĵojn, kiuj ankoraŭ restas en mia memoro kiel valoraj.

Mi konscias, ke la supra dirado ne estas kompleta, do ne tute ĝusta. La nivelo de kelkaj gazetoj en la recenzarto estas tre alta; mi menciis

ilin. Tamen, larĝe vidate, la situacio estas tia, ke tradukantoj de gravaj verkoj en Esperanton devas senti ne malgrandan dozon de amaro kaj malkuraĝigo. Ŝajnas, ke ni havas pli da aŭtoroj kaj tradukantoj ol da vere elstaraj recenzantoj. La klara devo de homoj posedantaj la literaturan kaj pensanalizan kapablon estas prezenti siajn ideojn kaj aprezojn pri tiuj verkoj por la ĝenerala edukado de la Esperanta popolo, kiu bedaŭrinde pro manko de tia eduka laboro, postrestas en la kampo de la libro-aĉetado—kaj ĝuado. Pli da libro-aĉetantoj, pli la libroĝuantoj—tial, pli da bonaj recenzantoj, kiuj finfine naskiĝos en iliaj rangoj.

Kvalitoj de Recenzantoj

La ĝusta, honesta recenzado antaŭsupozas en la grandskala recenzanto la paciencon, inteligenton kaj ideemon necesajn por la tasko. Li devas esti ne rutinulo, homo de mallarĝa kulturo kaj fortaj kredkonvinkoj en la senco, ke tiuj konvinkoj aŭtomate fermas lian penson kaj menson kontraŭ aliaj kredskoloj kaj opinimondoj. Male, li estu homo de universala legemeco, kaj kapablo simpatie percepti la latentan veron en filozofiaj aŭ mond-rigardaj sintenoj cetere dubaj aŭ neakcepteblaj por li. Krome, li estu multe leginta en la verkoj de la grandaj kritikistoj de mondrenomo.

Se homo havas aparte fervoran kredon pri la religio, la ekonomio, la socio kaj la moralo, li devas ĉiam teni en penso la fakton, ke li ne recenzas por siaj samkredanoj, sed por la amaso da diverskredaj legantoj. Li tiel verku, ke lia personeco, per neperceptebla, subtila konvinkigo, glitigu ideojn en la kapon de la leganto. Prefere, levi demandojn ol dogmi asertojn — uzi la Sokratan metodon ol rekte instrui.

Tio temas pri la sencenhavo. Pri la stilo li devas havi propran koncepton de la bona internacia stilo kaj juĝi la recenzataĵon per tio. Bona vortordo, klara frazfarado kaj kristale esprimita pensofluo estas necesaj por la bona stilo. En verkoj de la cerbo—logiko, racio kaj tuta foresto de dusencaj, malklaraj esprimoj. En verkoj de la koro—la riĉa koloro, lirika fantazio, nuancŝanĝemaj vortoj spirantaj la sonĝe dolĉan nerealecon, kio karakterizas la vagojn de la pura spirito liberigita de la ŝnuroj de la ĉiutageco.

Klasoj de Libroj

Kompreneble la apero de vere granda verko aŭ traduko en Esperanto estas ne ĉiusemajnaĵo; plejparte la eldonoj estas modestaj — noveloj, personaj ide-prezentoj, lingvolibretoj kaj verketoj pri aktualaj temoj. Por la gravaj verkoj de internacia signifo, verkoj de profunda literatura valoro, la tasko ilin recenzi estas farebla nur por homo funde leginta kaj bone kulturita, se per taŭga recenzo oni volus havi takson de signifa valoro. Tion povas fari nur homo kun scio pri la relativeco de la penso kaj kredo, iliaj ŝanĝiĝoj dum la jarcentoj sub diversaj ekonomiaj, sociaj kaj aliaj premoj; krome li havu scion pri la variecaj skoloj de literatura esprimo kaj nacia aparteco.

Malmultaj homoj en Esperantujo estas tiel bele ekipitaj. Esperantistoj estus kontentaj kun malpli ol tio, se la laboro estus farita kun honesta peno redoni sentefikojn de la recenzanto, nome, se homo de ideriĉa menso honeste prezentus la impresojn, kiujn li ricevis legante la verkon, kaj kiujn liakrede ricevos multe da aliaj legantoj. La meza leganto ja estas la homo, kiu aĉetas la librojn, kaj la recenzanto devas ĉiam teni lin en la

penso: kiel ĉi tiu verko efikos sur la ordinaran homon? Kiel mi povas klarigi al li la ĝustan pensosintenon al la verko? Kiel simple prezenti ĝian dirvolon kaj glatigi por li la malfacilajn paragrafojn? Kiel averti lin kontraŭ tio, kio ŝajnas al mi evidenta sofismo?

La dua klaso de verko—la ĝenerala literaturo de modesta celo, kaj pure lingvaĵaj verketoj—estas taŭge recenzebla por ĉiu homo kapabla esprimi la pensojn sur afero pri kiu li sentas intereson kaj pri kiu li posedas sufiĉon da kono.

Pri specialaj temoj, sciencaj, medicinaj k.t.p. la afero staras alie. Nur homo kun la koncerna edukado povas taksi la valoron de neliteraturaj verkoj. Tio starigas apartan problemon por ni Esperantistoj. Ekzemple, kiom da nukleaj sciencistoj trovas sin inter ni? Se neniom, kiel recenzi verkojn pri la atomo? Certe, Esperantistoj sporade troviĝas en multaj sciencokampoj, sed la premo de ilia laboro ofte ne permesas al tiuj fakuloj recenzi Esperantajn verkojn cetere interesajn por ili.

Kiomlongo de recenzoj

Kiam Macaulay verkis recenzon, ĝi prenis la formon de longa eseo. Ekzemple, tiuj pri *La Vivo de Byron* (Moore), *La Historio de la Papoj* (Ranke) aŭ *La Progreso de la Pilgrimanto* (Bunyan). Recenzoj en la pli seriozaj anglaj kulturgazetoj—*The New Statesman* aŭ *The Spectator*—estas malpli longaj tamen imponaj pensostreĉoj en la esea formo. La spaco disponebla por Esperantaj redaktoroj ne permesas tiel detalan ideo-disvolvon. La enhavo do devas esti kerneca, trafe kompakta—diro multa en amplekso malmulta.

La Plugisto

J. L. Marris-Fransen v.d. Putte

(el *Stille Gepeinzen*)

ESTAS vintro en la arbaro, vintro sur la kampoj, la tuta naturo plena de serioza, simbola beleco. For estas la koloroj kaj odoroj, la kanto de la birdoj silentiĝis; for ankaŭ la moviĝemaj homoj. La vojoj kaj vojetoj estas senhomaj kaj forlasitaj, sed por tiu kiu aŭskultas per sia animo, nun en la arbaroj kaj sur la kampoj ekflustras voĉo pri gloraj, pri eternaj aferoj.

La araneaĵaj branĉetoj de la arboj klare siluetiĝas kontraŭ la palgriza ĉielo; kaj kie la somero indulge kovras per la foliaro tion, kio estas kreske deformita, tie la vintro postulas, severe honesta kaj sincera, ke ĉiu objekto montru sin tiel, kiel ĝi vere estas.

Ĉiu branĉeto, ĉiu nodo, ĉiu linio estas videbla, kaj kiam poste la lignohakisto venos, li tuj vidos, kiuj trunkoj devos fali, pro tio ke ili, mortaj, senvaloraj, minacas iĝi danĝeraj por la ĉirkaŭaĵo, tuj kiam nova printempo plipezigos la supron per juna foliaro.

Kaj dum mi staras apud la arbarando kaj aŭdas la hakilbaton, kaj poste vidas, kiel kun tondra krakado la arbargiganto falas teren, antaŭ mi, sur la kampoj, iras la plugisto.

Tri sinsekvajn tagojn mia vojo kondukis min preter tiu kampo, kaj tri tagojn mi vidis lin supreniri kaj malsupreniri la monteton, turni sian plugferon kaj tranĉi la sulkojn ĝis malproksime en la ebena kampo.

La unuan fojon tie estis gaja vintra suno, kiu brilis sur la fero, kaj tiel sprite igis kontrasti la bluan de la kitelo kaj la blankon de la ĉevalo

kontraŭ la ruĝbrunaj pulvoraj terbuloj. De tempo al tempo ili aperis sur la montetosupro: la viro, la ĉevalo kaj la plugilo, en precizaj linioj, kiel siluetoj; poste ĉio dum momento malaperis malsupren.

La duan fojon la suno estis kaŝiĝinta; super la kampo ŝvebis densa nebulo, kiu ĉiufoje kaŝis la plugiston antaŭ la okuloj; sed li venis kaj iris, supreniris kaj malsupreniris, turnis la plugferon, kun la sama senlaca diligenteco de hieraŭ.

La trian tagon delikata pluveto falis; la ĉevalo elvaporis, la vestoj de la plugisto gutis, la sulkoj estis plenaj de akvo. Sed ĉiam li supreniris kaj malsupreniris la monteton, kaj li turnis la plugferon, atentanta nek la malsekon, nek la koton; li ja sciis, ke li devas rapidi, se li volas fini sian laboron antaŭ ol la nokto venos, kiu eble alportos neĝon aŭ akran froston, kiu povos rigidigi la teron.

Malantaŭ mi sonas la hakilbato, ĉirkaŭ mi falas la arbargigantoj, sed antaŭ mi iras la plugisto. Kaj estas al mi kiel simbolo de nia vivo; simbolo de la eterna interŝanĝo inter iro kaj reiro, naskiĝo kaj morto.

La hakilbato de la Morto sonas en niajn orelojn, sed samtempe ni metas la manon sur la plugilon kaj iras ridetantaj renkonte al la estonteco, esperante ke ĝi poste donos al ni la fruktojn de nia laboro. Feliĉa estas tiu, kiu tiam, same kiel la plugisto, iras sian vojon, en suno kaj pluvo, kiam la nebulo de ĉagreno kaj dubo ĉirkaŭas lin, senlace, laborante, tiel longe kiel daŭras la tago.

Trad. Betsy Leopold.

Luigi Minnaja :

La Agrara Reformado en Italujo

LA agrara reformado apogas siajn bazojn sur la kristana principo esprimita de Sankta Aŭgusteno: “La superfluo estas la necesajo de la malriĉuloj; posedi la superflumon signifas posedi la propraĵon de la aliaj”.

Sekve oni devas fiksi kiel bazon de ĉia diskuto, ke la agrara reformo en Italujo ne devas esti konfuzata kun simpla tersanigo. La elproprigo de la kampoj de la grandaj bienuloj estas efektivigita por formi tiun malgrandan “kamparanan” propraĵon, kiu estos la bazo de sana moderna Socio.

Por bone kompreni la novecon de la reformo, kiu ne estas la daŭrigo de la asignado de kampoj al la militintoj, kiel tiuj efektivigitaj en Italujo post la fino de la unua tutmonda milito, estos bone pristudi kaj ilustrati la diversajn fazojn de la realigo.

Estas kreitaj en Italujo diversaj institutoj por la realigo de la reformo, kaj ĉiu el tiuj institutoj agas sendepende de la Ministerio pri Agrikulturo.

Por iniciati la reformon estas elektitaj la kampoj ĝenerale malbone kulturataj kaj apartenantaj al grandaj bienoj. Sekve la institutoj anstataŭas la posedantojn, sed nur por efektivigi la aranĝadon kaj la dividon de la grundoj inter la posedantoj. Ili prizorgas antaŭ ĉio ilian aranĝadon, biendividon kaj, kie estas necese, la konstruadon de vojoj, kamparaj domoj, staloj k.t.p. Tiel la manlaboristoj kaj la kampuloj iam laborintaj sur tiuj terenoj, estas laŭgrade transformataj al rektaj kulturantoj kaj posedantoj de la kampo, kiun ili prilaboras.

De la momento de la elproprigo fare de la Instituto ĝis la momento de la asignado al la nova posedanto, rekta kulturanto, ne devas pasi, laŭ la leĝo, pli ol tri jaroj, dum kiuj la instituto efektivigos la tersanigon. Asignado al la kamparano signifas vendon. Tuj post la liverado, la kamparano komencas ĝui la profiton de la grundo kaj de ĉio troviĝanta sur ĝi. Li fariĝas ankaŭ ĝia posedanto, sed kun la devigo pagi dum tridek jaroj jaran kotizon, kiel ni poste klarigos. Fakte, oni ne devas kredi, ke la ŝtato, pere de la institutoj, elproprigis la kampojn de la iamaj posedantoj, sen kompensa pago. La Institutoj por la Reformo pagis la kampojn elproprigitajn, sekve ĉiu ligilo kun la antaŭaj posedantoj estas solvita. Tial la nova posedanto devos repagi al la instituto, krom la tersanigaj elspezoj, ankaŭ la prezon de la tereno, pagitan al la posedinto. Sekve, kiel ni diris, la nova farmulo tuj ĝuas ĉiun profiton kaj posedas la malgrandan bienon je la kondiĉoj ĉion pagi dum tridek jaroj. La instituto rezervas al si la rajton rompi la kontrakton, kiam la kampulo ne plenumas la kondiĉojn fiksitajn en la kontrakto kaj en la kunigita teksto, kiu estas nedisigebla parto de la kontrakto mem.

Konklude, la kontrakto estas regule registrita, kiel ĉiu kontrakto de aĉetovendo, ĉu ĉe la Notario, ĉu ĉe la Registra Oficejo, kun la kondiĉo de rezervita propraĵo por la Instituto. La tipo de kadastra partumado estos redaktata de teknikisto indikita de la Instituto.

La jara kotizo por la du unuaj jaroj ne entenas la interezojn; poste, post

la dua jaro, ĝi entenas ankaŭ la tre favoran interezkotizon de 3.5%. Sed la kotizo ne estas kalkulita bazante ĝin sur la sumo de la elspezo farita por pagi al la posedinto, plus la elspezoj por la tersanigo, sed bazante ĝin sur cifero, kiu maksimume atingos la du trionojn de tiu sumo. Sekve la akiranto estas favorata en ĉiuj eblaj manieroj : malalta prezo de la tereno, plej malgrandaj elspezoj por tersanigo, tre malalta interezo kaj fine, rabato de unu triono de la sumo jam tre malgranda, kiun li devus pagi laŭ tiu ĉi kalkulo.

Ni jam diris, ke la Instituto, dum la 30 jaroj, kiujn la akiranto disponas por tute pagi sian grundon, havas la rajton rompi la kontrakton, nome forigi la akirinton. Laŭ la kontrakto kaj la kunigitaj kondiĉoj, tio povas esti farata nur en okazoj de escepte malbona konduto flanke de la akirinto, kiu obstine ne volas respekti la fiksitajn kondiĉojn kaj la bonajn regulojn de terkulturado. Li devas loĝi surloke, se ekzistas domo, kaj kulturi kiel bona familia patro laŭ la fiksitaj kondiĉoj ; konklude li devas montriĝi bona rekta kulturisto. Tio estas starigita por malebligi eventualajn spekulaciojn fare de la akirantoj kiuj, interalie, ne povas esti la efektivaj posedantoj antaŭ la fiksitaj jartrideko.

La instituto, efektiviginta la transpason de la malnova posedanto al la kamparano, kaj realiginta la sanigon de la tereno, ne forlasos la novajn malgrandajn posedantojn ; kontraŭe ĝi sekvos kaj prizorgos ilin, ĉu finance, per monpruntoj kiam estas necesa la starigo de kooperativoj k.t.p., ĉu donante sian teknikan helpon pere de specialaj kursoj, paroladoj kaj konsiloj fare de siaj teknikistoj. Dum tridek jaroj la Instituto gvidos kaj orientos

la agadon de tiuj novaj rektaj kulturistoj, kaj kunordigos iliajn produktplanojn, tamen respektante la apartajn posedrajtojn.

Ĉiam dum la jartrideko estas malpermesate al la akirinto lui aŭ vendi ĉu parte ĉu tute la asignitan kampon, dum liaj rajtoj ne povas esti objekto de protektaj decidoj nek de deviga agado, se ne favore al la Instituto.

Nun la manlaboristoj kaj la kampuloj de Italujo aŭ estas jam terposedantoj, aŭ atendastrankvile kaj konfidesian vicon, kiu alvenos por ĉiuj, kune kun nova vivo de laboro kaj paco.

La Limo. *de paĝo 107.*

laŭlonge de la arbarorando. Laŭte bojante Puli postkuras la terurigitan besteton, kiu fulmrapide malaperas en la direkto de la dratbarilo . . .

En la sekvanta momento akra, eksploda bruo plenigas la aeron. Terpecoj, splitoj kaj ŝtonoj ĵetiĝas vasten. Forta puŝo trafas la terenkurbitan dorson de Anna Burgler. Samtempe nekonata mano alten suprenlevas ŝian korpon, kiu ŝajnas esti al ŝi senpeza, kvazaŭ en la nenio ŝvebanta. Ŝiaj mirigitaj okuloj ensorbas la klaran bluan de la vasta aero, el kiu eksonas fremda dolĉa muziko, intermiksiĝas voĉoj sam-momente kunsonaj kaj sekretplene flustrantaj. De malproksime aŭ diĝas alvoko de Karlo, la etendita montrofingro de la Kreinto tuŝas ŝian ĉieldirektitan frunton ; kaj tute proksime ĉe ŝia orelo ŝi aŭdas la mallaŭtan, kontentan ridon de Jozefo. Kaj super ĉio sterniĝas forta, brilanta, ora lumo . . .

Kun ridetanta esprimo sur la trajtoj ŝi falegas teren. Ŝia vizaĝo kuŝas en freŝe fosita sulko de la benata, bruna, patrina tero.

T. K. Slade :

Voko al individuaj Esperantistoj

IUFOJE oni aŭdas, kiel klarigon pri la velko de grupoj, ke oni ne povas sufiĉe okupigi la novebakitajn, kaj tial perdiĝas intereso. Tamen ekzistas grava okupado por kiu Esperantistoj pli taŭgas ol iuj aliaj.

Ni ĉiuj, ĉu ne, sopiras al tia plibona mondo, kiun ebligus la forigo de milit-minacoj. Multaj homoj klopodas per diversaj rimedoj prokrastigi la ekaperon de la monstraĵo, sed, bedaŭrinde, per rimedoj, kiuj, laŭ mi, ne estas vere esperigaj. Mi ne riproĉas ilin pro tio, ke, fronte aktualan minacon, ili serĉas tujan rimedon, kaj preterlasas la pli esperigajn vasthorizontajn rimedojn kiuj, kvankam malrapidegaj tamen entenas sekuran promeson.

Tiuj, kiuj fieras, ke ili “frontas faktojn” kaj tute malŝatas “utopiajn revojn”, klopodas per “praktikaj” rimedoj perfortaj. Je alia ekstremo iuj bazigas sian filozofion sur miskompreno de la teksto “Ne rezistu al malbono”, komprenante tion kiel tute pasivan sintenon. La erarojn de ambaŭ klarigas tekston el Marko kiu pliampleksas la sencon de la antaŭa ĝis “Ne rezistu malbonon per malbono.”

Plenaĝuloj spertis dufoje en siaj vivoj, ke milita venko lasas problemojn ankoraŭ solvotajn, precipe novajn militojn. Necesas trovi rimedon pli spiritan, efektive pli Kristanan, unuvorte la Amo.

Nu, mi certe kredas, ke multaj forĵetos tiun sugeston kiel utopiaĵon, se ne frenezaĵon; tamen ni ĉiuj povas memori pri planoj celantaj tujan rezulton, kiuj aspektis tute

esperplenaj, sed kiuj aŭ malsukcesis aŭ enkondukis aron da novaj solvendaĵoj. Aliflanke, pli vasthorizontaj planoj ofte aspektas tiel, kiel ili ne rekte celas siajn verajn celojn, sed kiuj, post longa tempo atingis firman rezulton. Ĉi tio kristaliĝas en la popola sentenco: la plej longa ĉirkaŭvojo ofte proponas la plej mallongan elirvojon.

La doktrino pri la Amo estas centra admono en la Kristana religio, efektive en preskaŭ ĉiuj religioj—krom eble Islamo—sed, bedaŭrinde, nuntempe ĝi ricevas nur vortan subtenon. Por la plimulto da Kristanoj “najbaro” limiĝas je “samlandano”, almenaŭ “samhaŭtkolorulo”, kaj jen la punkto kie Esperantistoj povas—kaj devus—eniri. Ĉiuj kiuj jam havis la sperton kontaktiĝi kun alilanduloj, kun lingvoj reciproke nekonataj, ne povas ne konstati okazan ŝokon: “ne estas fremdulo, estas homo!” Multaj homoj posedas amikojn el fremdaj nacioj, sed la kontakto necese fariĝas, almenaŭ unuflanke, per fremda lingvo, kaj la konscio de esenca “homeco” perdiĝas. Pro tio Esperantistoj plej taŭgas por starigi kruc-militon per la Amo. Ankaŭ rimarku, ke ĉi tio ne estas afero por instancoj; Zamenhof mem klare konstatis, ke ni ne devus fidi al instancoj, sed laboradi individue. La vojo estos longa, kiel li klare antaŭvidis, kaj malesperiga, kiel li ofte proklamis, tamen finfine certa.

Fronte al tiu tezo, oni eble respondos: “kion mi povas fari?” La tereno sur kiun individuo povas influi estas tre malvasta, tamen

fino sur paĝo 128

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 259

2-an de Marto 1954

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Februaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Februaro 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj	2792	1694
Individuaj membroj :		
MJ 487	578	
MA 2782	2882	
MS 444	542	
Patronoj .. 6	6	
DM 259	269	
HM 58	56	
	4036	4333
	6828	6027

DELEGITOJ

Belgujo

Brussel. FD (Agrikulturo) : P. Van Geit, Veeweydestraat 103, Anderlecht—Brussel.

FD (Vegetarismo) : vakas.

Dendermonde. D : vakas.

Britujo

Birmingham. FD (Kaŭĉuka industrio) : vakas.

Danujo

Viborg. D : O. Jensen, Lille Sct. Hansgade 27. Tel : 364.

Finnlando

Peräseinäjoki. D : Tapio Niemelä, Peräseinäjoki kk.

Francujo

Arles-sur-Rhône. VD : R. Motto, 4 Rue Pierre Sémand.

FD (Fervojoj) : La VD.

Clermont-Ferrand. VD : F-ino M. T. Valleix, 31 Boulevard Trudaine.

Houdain (Pas-de-Calais). D : B. Samborek, 17 Rue des Bouleaux.

Le Mans. D : M. Bodereau, 11 bis Rue Chanzy.

Italujo

Cagliari. D : R. Porceddu, via Lepanto 43. FD (Sporto) : La D.

Japanujo

Hakodate. D : S. Yoshida, ĉe Daiichi Ginko, 11 Suehiricho. Tel : 3210.

Yao. D : Itoo-Kooiĉi, 615 Yao-Yamamoto, apud Osaka.

FD (Arkitekturo) : La D.

Jugoslavujo

Zagreb. FD (Turismo) : F-ino Jadranka Boras, Maksimirska 28.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Ryden, F-ino E., Lärje, Svedujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

449. Belinfante, D-ro F. J., Lafayette, Ind., Usono

450. Buchheim, S-ro W. A., Denver, Col., Usono

451. Ehrenschwendter, S-ro H., Lenzing, Aŭstrujo

452. Höfert, S-ro F., Wien, Aŭstrujo

453. Kaltenegger, S-ino H., Kalwang, Aŭstrujo

454. Jelenc, S-ro F., Alger, Alĝerio

455. Courtis, S-ro A., Port-Gentil, Gabono

456. Ledannois, S-ro M., Clamart, Francujo

457. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan, Francujo

458. Douglas, S-ro H. F., Rijswijk, Nederlando

459. Lingva, S-ro H. A., Rosario, Argentino

460. Beeckmans, S-ro J., Antwerpen, Belgujo

461. Boffejon, S-ro H., Antwerpen, Belgujo

462. Couvreur, S-ino M., Bruxelles, Belgujo

463. Cazaudarré, S-ro F., Sidi-Yahia-du-Rharb, Maroko

464. Cuené, S-ro M., Meknés, Maroko

465. Qilivic, S-ro J., Marrakech, Maroko

466. Malmgren, S-ro E., Stockholm, Svedujo

467. Moura Pereira, S-ro F., Lobito, Angolo

468. Salles, S-ro A., Caramulo, Portugalujo

469. Saldanha Carreira, S-ro J., Lisboa, Portugalujo

470. Minnaja, S-ro L., Roma, Italujo

471. Ashworth, S-ro H., Liverpool, Anglujo

472. Blacklock, S-ino A. L., Ipswich, Anglujo

473. Clarke, S-ro W., Dunfermline, Skotlando

474. Cocks, S-ro E. P. B., Stoke-on-Trent, Anglujo
 475. Cottam, S-ro T. E., Sunderland, Anglujo
 476. Cronin, F-ino A. L., Andover, Anglujo
 477. Eldon, S-ro H. B., Southport, Anglujo
 478. Garraway, F-ino E., Sheffield, Anglujo
 479. Gibson, D-ro W. A., Bathgate, Skotlando
 480. Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Anglujo
 481. Hamilton, S-ro M. G., Southampton, Anglujo
 482. Mallett, F-ino E. E., Edgware, Anglujo
 483. Relf, S-ro E. F., Addlestone, Anglujo
 484. Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Skotlando
 485. Karlsson, F-ino H., Klippan, Svedujo
 486. Larsson, F-ino E., Boden, Svedujo
 487. Asp, S-ro B., Johanneshov, Svedujo
 488. Carrfors, S-ro H., Bromma, Svedujo
 489. Gerdman, S-ro B., Stockholm, Svedujo
 490. Jensie, S-ino M., Jönköping, Svedujo
 491. Olsson, F-ino A., Göteborg, Svedujo
 492. Sjöberg, S-ro H., Gnosjö, Svedujo
 493. Valette, F-ino M., Tarbes, Francujo
 494. Geers, F-ino B., Antwerpen, Belgujo
 495. Hillestad, S-ro P., Oslo, Norvegujo
 496. Jensson, S-ro A., Oslo, Norvegujo
 497. Thorvaldsen, S-ino E., Oslo, Norvegujo
 498. Borčić, F-ino L., Zagreb, Jugoslavujo
 499. Lagoutte, S-ro A., Pagoumène, Nova Kaledonio
 500. Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo
 501. Lagarde, S-ro L., Paris, Francujo
 502. Leleu, F-ino L., Mulhouse, Francujo
 503. Petit, S-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo
 504. Bat, S-ro, Meknès, Maroko
 505. Carlioz, S-ro A., Khemisset, Maroko
 506. Denarnaud, S-ro, Meknès, Maroko
 507. Lecoœur, S-ro P. G. C., Rabat, Maroko
 508. Marmol, S-ro A., Rabat, Maroko
 509. Rousseau, S-ro H., Mazagan, Maroko
 510. Bugge-Paùlsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo
 511. Llinás Bellvehí, S-ro A., La Laguna, Kanariaj Insuloj
 512. Pedrals, S-ro R. M., Moyá, Hispanujo
 513. Barkhausen, S-ro H., Bremen, Germanujo
 514. Deneffe, S-ro J., Hochheim, Germanujo
 515. Dresselhaus-Brockmann, S-ro H., Schloss Holte, Germanujo
 516. Engler, F-ino M., Mainz, Germanujo
 517. Gerwin, S-ro R., Jr., Lobberich, Germanujo
 518. Glasow, S-ro R., Ibbenbüren, Germanujo
 519. Huch, S-ro W., Mainz, Germanujo
 520. Kreutzer, D-ro J., Frankfurt, Germanujo
 521. Lanka, F-ino H., Hamburg, Germanujo
 522. Mutschler, D-ro W., Klosterreichenbach, Germanujo
 523. Otterpohl, S-ro H., Wiedenbrück, Germanujo
 524. Renken, D-ro C., Bremen, Germanujo
 525. Schernus, D-ro W., Reinbek, Germanujo
 526. Westenberger, D-ro H., Fulda, Germanujo
 527. Wuenschel, S-ro H. P., München, Germanujo
 528. Grütter, S-ro L., Samedan, Svislando
 529. Rizzo, D-ro Pietro, Perugia, Italujo
 530. Viti, S-ro G., Messina, Italujo
 531. Aitchison, S-ro G. R., Northampton, Anglujo
 532. Fraser, F-ino R. G. M., Ilford, Anglujo
 533. Somerville, S-ro H. T., Bolton, Anglujo
 534. Collins, S-ro E., Hamilton, Kanado
 535. Doneis, S-ro A. F., Pharr, Texas, Usono
 536. Agnar, S-ro H., Bell Gardens, Calif., Usono
 537. Ronda, S-ro J., Meknès, Maroko
 538. Hoyle, F-ino I., Huddersfield, Anglujo
 539. Langman, S-ro D. J., Wellington, Nov-Zelando
 540. de Waal, S-ro S., Pietermaritzburg, Sudafriko
 541. van Drunen, S-ro A., Cape Town, Sudafriko
 542. Kushlick, S-ro I., Johannesburg, Sudafriko
 543. Popović, Prof. B., Sarajevo, Jugoslavujo
 544. Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando
 545. Pot, S-ro C., Slikkerveer, Nederlando
 546. Fourniere, S-ino G., Longjumeau, Francujo
 547. Bastien, Generalo L., Paris, Francujo
 548. Barbieri, S-ro R. A., Montevideo, Urugvajo
 549. Heimann, D-ro W., Montevideo, Urugvajo
- DONACOJ al la Ĝenerala Kaso :** H. P. Wuenschel 9ŝ., S. de Waal 20ŝ., W. Cunningham 5ŝ., H. J. Bridger 82ŝ. 6p., C. J. Guildford 10ŝ. 7p., S-ino E. B. Knight 5ŝ., W. L. Simpkins £10, E. Smith 10ŝ. 6p., S-ino N. Goodliffe 5ŝ., E. Cocks 4ŝ., F-ino M. Ford 8ŝ.
- DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo :** Eindhoven (LEEN)-grupo 18ŝ. 6p., J. Boering 1ŝ., A. Llinás 10ŝ., Verda Kolombejo 18ŝ., Hamburga E.S., 83ŝ., W. L. Simpkins £5, Bristol E.S. 10ŝ., W. F. Westmancote 10ŝ., "Sheffieldanoj" 40ŝ., B. W. Reich 40ŝ., S-ino C. P. Thomas 33ŝ., Maison Ernest Solvay £27-10ŝ.,

N. Divall 5ŝ., Skota Fed. Esp. £5, G. Vermandere 20ŝ., Portugaloj pere de J. Antunes 84ŝ., Itala Esp. Fed. £5, Bologna E.S. 43ŝ. 5p., A. Del Santo 5ŝ. 8p., per Portugala Blindula As. 11ŝ. 11p., La Norda Lumo, Tromsø 50ŝ., J. Delor 9ŝ., M. Fabert 20ŝ., L. Pauvrehomme 20ŝ., S-ro Hullin 20ŝ., S-ro Broise £5, S-ino G. Kraft 10ŝ., S-ro Staub 10ŝ., L. Bastien 20ŝ., Bildstock E.S. 20ŝ., J. L. Tortel 40ŝ.

Sumo ĝis 27.2.1954 : £371 6ŝ. 0p.

Sincera dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Voko al Esperantistoj. *de paĝo 125*

multaj individuoj are povas influi sur vastan terenon; kaj pripensu la himnon: "... guto malgranda ..."

Tro ofte la individuo malatentas tiun terenon, kie li vere forte povas efiki—si mem; kaj ia plibonigo en la sinteno de individuo neeviteble influas sur ĉiujn kunulojn.

Ni Esperantistoj devus pli bone ol aliaj batali kontraŭ malamo en ĉiuj formoj, kultivi kaj prediki la toleremon—kaj rimarku, ke toleremo ne subkomprenas aprobon. Precipe mi direktu niajn klopodojn sur la infanojn. En multaj familiaj rondoj infanoj kutimiĝas observi plenaĝulajn malakordojn, kies solvoj (?) instruas al ili, ke povo regas ĉion. Ĉu ni povas miri, ke tiuj infanoj estonte sekvos perfortajn rimedojn?

Mi konsentas, ke la penado dissemi la Amon estos malfacila, kaj la videblaj rezultoj malesperigaj; tamen ĉiu Esperantisto devus enspiri el la verkoj de Zamenhof iom de lia amo al la homaro, kaj per konscia praktikado fine realigi lian sonĝon pri paca mondo".

Almenaŭ neniuj Esperantistoj devus diri: "kion mi povas fari?"—jen tasko kiu streĉos liajn tutajn fortojn.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Soudée. Al Ges. H. Soudée (2535 Belmont Road N.W., Washington 8, D.C., Usono) filino Odile, la 16-an de Februaro 1954.

Al ili ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Sakowicz. Fine de Februaro forpasis subite la edzino de Roman Sakowicz, nia antaŭa Ĉefdelegito en Pollando.

Walther-Born. S-ro Fr. Walther-Born, nia Delegito en Nd.-Gerlafingen, Svislando, mortis la 28-an de Januaro, 77-jara.

La unuan fojon depost la milito okazos denove seminario por Cseh-metodaj geinstruistoj, gvidota de S-ro Andreo Cseh mem. Kun la konsento de la LKK ĝi okazos en tri tagoj antaŭ la universala kongreso, 29an ĝis 31a de julio, kondiĉe ke sufiĉe da esperantistoj aliĝu antaŭ la 1a de majo.

Plenajn detalojn ricevu de: S-ro Cseh, Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Hiroŝima. Bone produktita foto-kajero 16-paĝa havebla ĉe Japana Esperanta Librokooperativo, 72 Kitaoogimaci, Kita-ku, Osaka, Japanujo kontraŭ 2 rpk. 25 ilustraĵoj pri la temo: la Atombombo.

Saarbrücken. Belega 24-paĝa kajero en germana lingvo, kun samformata (20 × 20 cm.) aldonaĵo en Esperanto 4-paĝa. Städt. Verkehrsamt, Rathaus, Saarbrücken.

Internaciaj FERIAJ Kursoj en Helsingør, Danlando eldonis prospekton pri tiuj multe ŝatataj kursoj. Ĝi estas havebla ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj mi havas tiun esperon al Dio, kiun ili mem ankaŭ akceptas, ke estos iam releviĝo de la justuloj kaj de la maljustuloj.

La Aĝoj 24. 15.

Internacia Kultura Semajno, 16–23 Julio 1954, en franca Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono S-ro G. Odent, Lycée Chanzy, CHARLEVILLE (Ardenes), Francujo. Karavano al Haarlem aranĝota fine de la monato. Represo petata.

Turista Informejo (Belgujo) rezervas pensionon kaj hotelĉambrojn. Sendas senpage prospektojn esperantlingvajn pri belgaj urboj (rpk. aŭ samvaloro). Konijnenperken 109, BOSVOORDE-Brussel, Belgujo.

Pri ekonomio, financo kaj komerco deziras korespondi T. A. Goldman, 825 East 60th Str., CHICAGO, Illinois, Usono.

La Arnhema sekcio de L.E.E.N. aranĝos en la fino de Majo letervesperon. Bonvolu sendi el ĉiuj partoj de la mondo ilustritajn poŝtkartojn. Respondo garantiata. Adreso : S-ino M. v. d. Wal-Brethouwer, Amsterdam-seweg 78, ARNHEM, Nederlando.

Ringwood Grammar School (Fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempoj.

24-jara kontoristino deziras korespondi kun hispanaj kaj francaj gesamideanoj. F-ino Ulla Tirkkonen, Mikkeliintie 35, VARKAUS, Finnlando.

Ĉina samideano deziras korespondi kun tutmondaj komercistoj kaj entreprenistoj. Bonvenigas ĉian ajn proponon rilate al komerco kaj servo. Volonte fariĝos ĉiu ajn komerc-reprezentanto en Hong Kong. Korespondas esperantlingve aŭ anglalingve per aerleteroj. Nepre respondos. S-ro Wong Ling Kai, 72 Lockhart Road, 1st Floor, HONG KONG.

Eks-kavaleria majoro (membro de la Internacia Asocio de Medicinaj Hipnotistoj), multe deziras korespondi per bildpoŝtkartoj kun fraŭlinoj tra la mondo. Skribu al S-ro L. James Cumper, 8 Beaconsfield Villas, BRIGHTON 6, Sussex, Anglujo.

10 gelernantoj, 25–40 jaraj, deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata. S-ro Bernt Johansson,

Västerviksgatan 19, HÄLSINGBORG, Svedujo.

Deziras korespondi kun gemuzikistoj. Folkloro muziko de aliaj landoj estas speciala intereso. 23-jara ; S-ino Lucille Williams, Wasatch Academy, MOUNT PLEASANT, Utah, Usono.

Bildetojn pri Nia Sinjorino, kiajn oni konservas en preĝlibro, kolektas kaj interŝanĝas S-ino Em. Chantrain, Deuzeldstr. 83, SCHOTEN, Antwerpen, Belgujo.

Austra librotenisto deziras kontakton kun ĉiulandaj fabrikistoj aŭ turista kaj aliaj organizaĵoj kiaj poŝtmark-interŝanĝantoj, kiuj bezonas agenton aŭ reprezentadon en Aŭstrujo. Skribu al Ridler, Fack 8, WIEN 15/101, Aŭstrujo.

5 knabinoj de supera lernejo, 14–16 jaraj, dez. korespondi. Unu vizitos la U.K. en Haarlem. Bonvolu skribi al Uta Gleiss, Gutenberg platz, ARNSBERG (Westf.), Germanujo.

Antaŭ Haarlem

SKOTLANDO VOKAS VIN !

**INTERNACIA
FERIA SEMAJNO**

Julio 24a ĝis 30a, 1954

en

**Newbattle Abbey Kolegio,
proksime al Edinburgh**

Modernaj komfortoj - Bonaj manĝaĵoj
Allogaj ekskursoj kaj aliaj distraĵoj
Modera kosto - Nur 60 lokoj

Skribu tuj por detaloj al :

**La Sekretario,
Edinburgh Esperanto Society,
20 Glendevon Road, Edinburgh 12,
Skotlando**

ESPERANTISTA FERIO EN LOFTHUS

11-18a de aŭg. 1954

Venu pasigi vian ferion en belega regiono Hardanger en okcidenta Norvegujo ! Intima, amika kunestado kun gesamideanoj el multaj landoj.

Kombine kun la feria restado estos kurso por studgvidantoj, kiun vi povos partopreni.

Prelegoj, diskutoj, distraĵoj. Allogaj ekskursoj. Ĉiujn informojn donos

**Okc. Distr. de N.E.L., Kristian Sivertsen,
Blekenberg 52, Bergen, Norvegujo**

En la listo de la 10 plej bonaj verkoj aperintaj post la milito (laŭ "Esperanto en Skotlando", "Nederlanda Esperantisto" k.a.) troviĝas ambaŭ verkoj de

D-ro Ivo Lapenna

RETORIKO kaj AKTUALAJ PROBLEMOJ

Nuna prezo : ĉiu libro 12 ŝil., afr. 6p.

Se vi ankoraŭ ne legis ilin, mendu tuj ĉe via landa libroservo aŭ ĉe :

**Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO

okazas por la tria fojo

24-30 Julio 1954 en Konstanz



Interesa kultura kaj turisma programo. Cseh-metoda perfektiga kurso. Ekskursoj al Aŭstrujo kaj Svislando.



**Petu invitilon ĉe : IFS Esperanto,
Grüngang 8, Konstanz,
Germanujo**

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**